

EL POPOLA ĈINIO

中國報

3

1980



Tajaj virinoj kaj infanoj

Fotoj de ZHANG WEI

Taja knabino



La tajoj vivantaj en Yunnan (Junnan)-provinco de sudokcidenta Ĉinio estas bravaj kaj laboremaj. De antikveco, ili estas intimaj membroj de la granda familio de naciecoj de nia patrolando.

El la pli ol 750,000 tajoj, pli ol 200,000 loĝas en Xishuangbanna de suda Yunnan. Post la fondiĝo de



Patrino kaj filino



Traktoristino

la Popola Respubliko en 1949, la tajoj transiris de feŭdisma socio en socialisman socion, kaj radikala ŝanĝo okazis al iliaj ekonomio kaj kulturo. La virinoj ĝuas egalajn rajtojn same kiel la viroj kaj ludas aktivan rolon en la socia vivo kaj la infanoj sane kreskas, ĝuante rajton de edukado.

Gum-arbaro





Bananoj!

EL POPOLA ĈINIO

1980

N-ro 3

(258)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

En la 20-a Monda Gimnastika Ĉampioneca Konkurso okazinta en Fort Worth de Usono, ĉina 15-jara knabino Ma Yanhong gajnis la mondan ĉampionecon de ŝtupa paralelado.

Foto de **ZHANG WEI** kaj
REN SHIYIN

BILDPAĜOJ:

1. KOLORA SERIO

Tajaj virinoj kaj infanoj

Foto de **ZHANG WEI**

2. NIGRA-BLANKA SERIO

Inĝeniero Zhan Shuquan

Fotoj de **QUAN YUXI**

3. KOLORA SERIO

Akvofaloj

Fotoj de **YAN JIN** kaj **HU MEI**

4. NIGRA-BLANKA SERIO

(1) Knabino kaj Pavo

Skulptita de

CHEN LONGSHENG

(2) Geedziĝa soleno de

Xinjiang-aj uĝuroj

Fotoj de **JIN BOHONG**

5. KOLORA SERIO

Lago Bled en Slovenio,

Jugoslavio

Foto de franco

RENE BASTONG

SUR LA DORSKOVRILO:

Folio-simio

Ĉin-stila pentraĵo de **LI HAN**

Enhavo

| | |
|--|----|
| Kunvenoj de ĉinaj Esperantaj organizoj | 2 |
| NIA KULTIVEJO: Perspektivo de Esperanto el "dek milionoj" | 3 |
| ESP-NOVAĴOJ | 6 |
| Saluton al la nova estraro de la Akademio de Esperanto | 8 |
| Ma Yanhong, nova gimnastika stelo | 9 |
| Pri la reformo de la sistemo de geedzeco kaj familio en Ĉinio | 11 |
| Kial mi amas lin? | 14 |
| Kiel oni traktas kazojn de eksedziĝo? | 17 |
| EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Mongola geedziĝa ceremonio | 19 |
| VIDINDAJ LOKOJ: Ĉinaj akvofaloj | 22 |
| La novaj konstruoj de la Beijing-a Internacia Aerodromo | 25 |
| La komedio "Du Ĝemeloj kaj Du Ĝemelinoj" | 28 |
| Konsekrado de nova episkopo en Beijing | 30 |
| KURANTAJ AFEROJ | 32 |
| Shao Lingfang — ĉina specialisto pri ezofaga kancero | 33 |
| Elekto de la Perlo (Daŭrigo) | 35 |
| EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La Unua Kunlaboro inter Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio | 38 |
| KULTURAJ NOTOJ | 42 |
| KORESPONDI DEZIRAS | 43 |
| POR INTERKOMPRENIGO | 44 |
| INTER NI: Danko kaj Respondoj | 46 |
| KARIKATURO | 47 |
| TRA LA MONDO | 48 |

Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de **GUOZI SHUDIAN**
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

KUNVENOJ DE ĈINAJ ESPERANTAJ ORGANIZOJ

Memore al la datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof
kaj la skribo de vortoj de prezidanto Mao Zedong

EN la mezo de decembro, 1979, la Ĉina Esperanto-Ligo kaj diverslokaj Esperantaj organizoj okazigis kunvenojn por celebri la 120-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof kaj la 40-an datrevenon de la skribo de vortoj de prezidanto Mao Zedong por Yan-an-aj esperantistoj.

La Ĉina Esperanto-Ligo okazigis kunvenon en Beijing (Pekino), en kiu oni aŭdigis la surbendigitan parolon de prezidanto de ĈEL Hujucz. En sia parolo li montris: "Disvastigo de Esperanto kreita de Zamenhof inter la pli ol 900 milionoj da ĉinoj havas grandan perspektivon. Ĉinio devas vaste kaj paŝpostpaŝe antaŭenpuŝi Esperanto-movadon, fari kontribuon por la monda paco kaj por tio, ke Esperanto fariĝu ĝenerale uzata internacia lingvo." Zhang Qicheng (Ĉ. Ĉen), membro de la Konstanta Konsilantaro de ĈEL parolis pri la tutlanda Esperanta movado en la lasta duonjaro: oni jam starigis Esperanto-Asocion respektive en unu provinco, unu aŭtonoma regiono kaj unu municipo kaj la starigo de Esp-asocio en du provincoj kaj du urboj estas en preparado. En la tuta lando pli ol mil personoj lernas Esperanton. Li emfazis, ke la situacio enlanda kaj internacia estas bonega, la Espe-

ranta laboro estas multe esperiga, kaj la ĉinaj esperantistoj devas daŭre klopodi en sia laboro, surbaze de la atingitaj sukcesoj. Ankaŭ veterana esperantisto Chen Zhaoying faris parolon pri fondo de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio kaj la Koresponda Lernejo fare de Hujucz, Bakin kaj li en 1920, kaj pri la subteno kaj helpo de la rusa blinda esperantisto Eroŝenko al la fruperioda Esperanta movado de Ĉinio.

La urbo Wuhan (Vuhan) estis unu el la luliloj de la ĉina Esperanta movado. Antaŭ pli ol 50

jaroj, tie jam komenciĝis la Esperanta aktivado. Je la 16-a de decembro lastjare, pli ol 250 esperantistoj ĝoje kunvenis tie. Inter ili estis blankharaj pioniroj, kiuj sin okupis pri disvastigado de Esperanto antaŭ 50 jaroj, veteranaj esperantistoj, kiuj kontribuis por la internacia Esperanta aktivado kaj la verkado kaj tradukado per Esperanto, kaj lernantoj de Esperantaj kursoj de institucioj, fabrikoj, minejoj, altlernejoj, ĵurnalistaj rondoj kaj literaturaj kaj artaj grupoj. Profesoro Xue Chengzhi (Seĉencz), prezidanto de la Hubei Esperanto-Asocio, ĉestis la kunvenon kaj donis parolon, en kiu li klarigis la profundan signifon memorigi la skribon de prezidanto Mao kaj la datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof kaj sincere esperis, ke esperantistoj bone lernos kaj uzos Esperanton por fari kontribuon al la kvar modernigoj de la patrolando kaj fortigo de sia

(Daŭrigo sur p. 10.)

Chongqing (Ĉongking)-aj esperantistoj celebras la 120-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof.





PERSPEKTIVO DE ESPERANTO EL “DEK MILIONOJ”

— *Memore al la 120-a datreveno
de naskiĝo de d-ro Zamenhof*

de ZHU MINGYI



L. L. Zamenhof en 1887

Tiu ĉi artikolo ne povis aperi ĝustatempe en la lasta numero de nia gazeto en la pasinta jaro pro ia kaŭzo. Nun ni publikigas ĝin kune kun la novaĵoj pri la festado de ĉinaj esperantistoj pri la naskiĝtago de d-ro Zamenhof. Kredeble ne perdiĝos ĝia signifo kaj valoro pro la malfruigo.


La Red.

Forpasis nur 92 jaroj de kiam Zamenhof publikigis sian broŝuron “Internacia Lingvo” en la jaro 1887, tamen Esperanto jam atingis ĝojindajn sukcesojn en sia evoluado.

Ĉe la komenco la embrion de tiu estonta internacia lingvo festis nur malmultaj diversgentaj gimnazioj lernantaj kune kun Zamenhof. Por sciigi pri la sinteno de la publiko rilate Esperanton, Zamenhof aldonis kelkajn blankajn paĝojn al la “Internacia Lingvo”, sur kiuj estis presita la jeno: “Mi, subskribita, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto Lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj da per-

sonoj donis publike tian saman promeson.” Li esperis, ke tiu, kiu aprobas tiun aranĝon, sendos sian promeson kun subskribo. Li eĉ pagis por afiŝo kun peto ke tiu, kiu ricevis la “Internacian Lingvon,” sendos sian opinion al li. Fakte li ne ricevis tiom da respondoj, kiom li atendis. Tamen en tiu tempo jam nemalmultaj komencis lerni kaj praktiki Esperanton, antaŭ ol dek milionoj da personoj donis publike sian promeson. Inter la unuaj lernantoj de Esperanto troviĝis rusoj, poloj, svedoj, germanoj kaj ankaŭ tiuj, kiuj lernis Volapukon furorintan en Eŭropo. Ilia entuziasmo estis ekster la atendo de Zamenhof.

Tamen en la socio multaj mokis, kontraŭstaris aŭ malpermesis Esperanton. Ili furioze kontraŭis ĝin kiel uragano blovegas plantidon. Ekzistis en la mondo tiom da homoj, kiuj estis subjektivaj, malkleraj kaj antaŭjuĝemaj. Ili ne vidis, ke pro la progresado de la mondo la lingva baro pli kaj pli evidentiĝis kaj kreo de internacia lingvo jam fariĝis aktuala bezono. Ili ne vidis ankaŭ la noblan spiriton de Zamenhof, ke li kreis Esperanton ne por propraj personaj intereso, sed por la feliĉo de la homaro. Kaj plie, ili ne volis studi kaj provi Esperanton por vidi, ĉu ĝi estas racia, sed opiniis, ke ili devas direkti la sorton de tiu lingvo



La broŝuro "Internacia Lingvo" publikigita de L. L. Zamenhof en 1887

laŭ sia subjektiva volo. Efektive la naturaj naciaj lingvoj havas iajn mankojn, kiuj malhelpas komuniĝon inter diversaj nacioj, tamen tio incitis nenium. Sed oni volis kritiki la lingvon artefaritan preskaŭ ĉiufanke kaj reformi ĉiun ĝian bagatelon kiu ne estis konforma al ties gusto.

Tie ĉi mi prezentu du ekzemplojn por montri, kiel ridindaj estas tiuj malaprobantoj de Esperanto: 1. signoj super literoj de naturaj lingvoj estis tre oftaj kaj neniam renkontis oponon, la supersignoj de Esperanto tamen estis neniel tolereblaj; 2. Se "j" aperis en la bela greka lingvo, neniun kuraĝis ĝin kritiki, sed kiam ĝi estis uzata kiel finaĵo de pluralo en Esperanto, ĝi estis severe kondamnita de la oponantoj.

Tiam Esperanto troviĝis en tiel malfacila situacio, ke Zamenhof demandis sin timeme: "Ĉu post 25 jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto?" Estis la interna

ideo de esperantismo, kiu donis al li kuraĝon, ke li, 28-jara junulo, volontis dediĉi al Esperanto la plej belan tempon de sia vivo, kaj ke li travivis grandan suferon.

Zamenhof mortis en 1917, kiam furiozis la Unua Mondmilito. Tiam Esperanto ankoraŭ ne akiris subtenon de dek milionoj da personoj, tamen ĝi eltenis la provon de senĉesa uragano, ĝi ne nur vivis kaj vivas, sed eĉ forte kreskis kaj riĉiĝis. Ekde 1905, ĉiujare okazis la Universala Kongreso de Esperanto. Kvankam ĝi ĉesis dum la Unua Mondmilito, tamen antaŭ la milito ĝin ĉeestis tre multaj homoj, iufoje eĉ 1,733 personoj el 42 landoj. La evoluo de la Esperanto-movado plenigis Zamenhof per memfido pri la venko de la afero de la internacia lingvo. Li certigis: "Nun nia afero staras forte. La glacia tavolo da antaŭjuĝoj de la mondo estas rompita, kaj nia afero kreskas regule kaj senhalte. Ĉiu jaro potence pligrandigas niajn fortojn. . . Tia lingvo ne bezonas jam timi, ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas." Probable tio estis lia plej granda ĝojo antaŭ la morto.

Okaze de la 120-a datreveno de la naskiĝo de la granda lingvomajstro Zamenhof, nia plej valora ofero al li eble estas la jena informo al li: Esperanto travivis 92 malfacilajn jarojn, kaj al ĝi estis varbitaj dek milionoj da personoj. Kiel giganta forto! Tiu nombro preskaŭ egalas tiun de la nepallingvanoj aŭ hungarlingvanoj, ĝi multe superis tiun de la mongollingvanoj, hebrelingvanoj, albanlingvanoj, finnlingvanoj, svedlingvanoj, islandlingvanoj,

greklingvanoj aŭ parolantoj de ĉiu el aliaj pli ol mil lingvoj.

Laŭ la statistiko de UEA en la jarlibro de 1979, aliĝis al UEA kiel membro 40 Esperanto-organizaĵoj el 38 landoj kaj esperantistoj el 90 landoj. Kaj nun aperadas pli ol 120 Esperanto-gazetoj de diversaj landoj. En la mondo troviĝas 14 radiostacioj de 12 landoj kun konstanta Esperanto-elsendo. Jam en la jaro 1925 la Internacia Telegrafica Asocio difinis Esperanton kiel unu el la lingvoj de telegrafica kodo. En 1954 UEA stariĝis konsultajn rilatojn kun Unesko. Ĉiujare UEA okazigas Universalan Kongreson de Esperanto, en kiu oni prelegas en Esperanto kaj interkomuniĝas per Esperanto. La plej granda nombro de partoprenantoj atingis 5,000.

La fakto pruvis Esperanton vivipova. Tamen troviĝas nun ankoraŭ tiaj homoj, kiuj ne vidas la perspektivon de Esperanto. Ili kalumnias ĝin kiel utopion. Sed mi volus demandi: Se Esperanto estus utopio, kial en pluraj jarcentoj la fama pola astronomo Koperniko, la angla fizikisto Neutono, la franca filozofo R. Descartes, la franca utopia socialisto C. Fourier kaj la germana filozofo Lejbnico ankaŭ havis ideon krei internacian lingvon? Kial post la apero de Esperanto la famaj literaturistoj Gorkij kaj Lusin, la germana matematikisto kaj fizikisto Ejstejn kaj ĵuj grandaj politikistoj, kiel la forpasinta ĉina prezidanto Mao Zedong, la forpasinta bulgara prezidanto Dimitrov kaj la jugoslava prezidanto Tito, ĉiuj subtenis Esperanton? Mi volus demandi ankaŭ: Dum la lastaj 300 jaroj aperis en la mondo pli ol 500 projektoj por komuna lin-

gvo, sed ĉiuj malsukcesis. Kial Esperanto sola postvivis, ne malfortiĝis, sed evoluas kontinue?

Mi estas mezaĝa, sed mi dediĉis multajn jarojn al lernado de fremdaj lingvoj. Mi lernis la anglan lingvon dum ses jaroj en mezlernejo. Mi ne ellernis ĝin pro la malfacilo en prononco kaj parkerigo de vortoj, kaj tial mi ne povis komunikiĝi kun britaj amikoj per tiu lingvo. Mi lernis la rusan lingvon en alta lernejo. Mi trovis ĝian prononcon kaj parkerigon de vortoj pli facilaj, sed ĝian gramatikon tre komplika. Mi ankoraŭ ne bone ĝin posedas, kvankam mi jam povas labori per ĝi. En 1963 mi ekleris Esperanton, kiu havas regulan gramatikon, internacian vortaron kaj aglutinecon en vortfarado. Mi uzis malpli multe da tempo ol kiom mi bezonis por lerni naciajn lingvojn, tamen mi pli multe progresis. Nur duonjaron post mia eklerno de Esperanto, mi jam provis traduki artikoleton por "El Popola Ĉinio". Kaj post malpli ol unu jaro, mi jam povis esperantigi la artikolon de prezidanto Mao "Servu al la Popolo".

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta

Disaŭdigo de Radio Pekino

| Pekina Tempo | GMT | Al Regionoj | Ondoj kHz (m) |
|--------------|-------------|-----------------|--------------------------|
| 4:00-4:30 | 20:00-20:30 | Eŭropo | 43.7 6860 31.9 9380 |
| 19:00-19:30 | 11:00-11:30 | Japanio, Koreio | 41 7315 30.4 9860 |
| 21:00-21:30 | 13:00-13:30 | Sudorienta Azio | 25.6 11685 19.8 15145 |

Dum mia laboro mi havis ŝancojn kontaktiĝi kun geesperantistoj de Britio, Francio, Germanio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando, Svisio kaj Usono. En la pasinta jaro mi korespondis kun geesperantistoj de Aŭstralio, Brazilo, Britio, Finnlando, Francio, FR Germanio, Hispanio, Japanio, Meksikio, Nederlando, Portugalio, Svedio, Svisio kaj Usono. Se mi ne havus Esperanton kiel komunikilon, ĉio tio estus neimagebla kaj neebla.

La nekontestebla fakto pruvis, ke lingvo estas primare grava komunikilo por la homaro. Ju pli progresas la socio, des pli oftigas la komunikiĝo inter diversaj nacioj, kaj la lingva baro fariĝas akra problemo por ni ĉiuj.

Retrorigardante la 92-jaran historion de Esperanto, ni sentas pli karaj la jam akiritajn sukcesojn. Rigardante al la estonteco, ni vidas, ke brila estas la perspektivo de Esperanto. Mi plene aprobas kion Zamenhof diris pri Esperanto: "Lingvo internacia ne povas esti alia ol Esperanto . . . Se iam la esperantistoj mem aŭ iam granda ekstera forto decidus fari en Esperanto iajn ŝanĝojn, tiuj ŝanĝoj povos esti nur ekstreme malgrandaj, neniam rompos la kontinuecon kun tio, kion ni ĝis nun havis, kaj neniam senvalorigos tion, kion ni ĝis nun faris, faras, aŭ poste faros." Mi profunde konvinkiĝis, ke frue aŭ malfrue certe venos la tago, en kiu Esperanto fariĝos vere internacia komuna lingvo.


La 64-a UK de Esperanto, okazigita en Lucerno de Svislando en 1979



NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Ĉe la sojlo de 1980 prezidanto de UEA Humphrey Tonkin faris novjaran mesaĝon al Esperanto-organizaĵoj kaj esperantistoj de la mondo. En la mesaĝo li diris: “Dum la jardeko, kiu nun malfermiĝas antaŭ ni, la Internacia Lingvo Esperanto fariĝos centjara. Tra la jaroj de post 1887, la lingvo alportis ĝojon kaj feliĉon al milionoj da homoj. Ĝi malfermis la horizontojn al simplaj civitanoj, ĝi dissemis sentojn de internaciismo kaj komprenemo en mondo malpaca, ĝi kreis kulturajn pontojn inter la nacioj, kaj ĝi ebligis praktikan komunikadon inter la homoj en spirito de egaleco.” Li diris plie: “Restas tamen la demando, ĉu tiu lingvo plene elprovita fariĝos akceptita de la grandaj internaciaj organizaĵoj, la diverslandaj edukaj sistemoj, kaj la ĉiam kreskanta nombro da homoj, kiuj partoprenas la internacian komunikadon. Restas la demando, ĉu oni utiligos ĝin kiel lingvon de la nova komunika teknologio. Aŭ ĉu oni preferas solvi la internacian lingvan problemon per diskriminaciaj solvoj, favorante certajn naciojn kaj lingvojn, kaj malfavorante aliajn?” “Ĉu, do, la jardeko de la 1980aj jaroj estos la jardeko de Esperanto, la jardeko, en kiu oni fine konsciiĝos pri la maljusteco kaj la nenece-saj kostoj de la nuna internacia lingva reĝimo? Lingvoj ne kreskas kiel arbaraj fungoj: ili bezonas jardekojn, eĉ cent jarojn, por maturiĝi. La Internacia Lingvo jam kreskis kaj maturiĝis: ĝi staras nun preta por tiuj, kiuj pretas utiligi ĝin.” Je la fino li diris: “Malfermiĝas al ni iom post iom la internaciaj organizaĵoj, la publika opinio. Pretas nia Asocio. Je tiu ĉi favora epoko, je la sojlo de nova jardeko, ni rede-

diĉu nin al la laboro por la Internacia Lingvo per novaj fortoj. La jaro 1980, kaj la tuta jardeko, kiun ĝi inaŭguras, alportu pli pacan, justan kaj harmonian mondon, kie la spirito de egaleco kaj kompreniĝo animas ankaŭ la lingvan kampon per la Internacia Lingvo Esperanto.”



FONDIGIS ESPERANTA ASOCIO DE LA INTERNA MONGOLIO DE ĈINIO

Je la 9-a de decembro, 1979, okazis en Huhhot (Huhehoto) la kongreso por fondi la Esperantan Asocion de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

Ĝin ĉeestis Hao Fan, prezidanto de la Sociologia Akademio de tiu regiono kaj ĝia vicprezidanto Herlun, kaj aliaj gvidantoj. Buho, membro de la KPĈ-a Konstanta Komitato de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, unua sekreta-

rio de la KPĈ-a Urba Komitato kaj urbestro de Huhhot, faris paroladon en la inaŭguro. Li diris: “Lingvo estas komunikilo de la homaro. Esperanto, ĝuste kiel prezidanto Mao diris, povas esti lernata kaj devas esti lernata, ĉar ĝi utilas al interŝanĝo de kulturoj kaj amikaj kontaktoj inter diverslandaj popoloj.” Li varme gratulis esperantistojn pro la fondiĝo de la asocio.

La kongreso aprobis la statuton de la asocio kaj elektis Wang Zaitian kiel ĝian honoran prezidanton, Yang Lingde kiel ĝian prezidanton, Wu Daping, Xiang Quanshen, Yan Yisheng, Mi Jisheng kaj Zhang Naijun kiel ĝiajn vicprezidantojn. La lasta funkcias samtempe kiel ĝia ĝenerala sekretario.

En la kongreso oni voĉlegis gratulajn telegramojn kaj leterojn de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj de Beijing (Pekino), Hubei- kaj Jiangsu-provincoj kaj de esperantistoj de multaj lokoj de Ĉinio.

La Televida Stacio de la regiono filmis la kongreson kaj ĝin dissendis.

La Inaŭgura Kongreso de la Esperanta Asocio de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio



ESPERANTO-KURSO EN ĈINA INTERNACIA VOJAĜA SERVO

Turismo prosperiĝas en Ĉinio, kaj por ĝi pli kaj pli utiliĝas Esperanto. Nun venis ĝojinda informo ke Esperanto-kurso ekfunkciis en Ĉina Internacia Vojaĝa Servo, dank' al la klopodoj de esperantistoj en la nomita servo, subtenate de la koncernaj gvidantaj personoj. Ĝi fondiĝis je la 14-a de decembro 1979, antaŭ la 120-a datreveno de la naskiĝo de nia majstro L. L. Zamenhof, kun la celo propagandi kaj disvastigi Esperanton kaj fari necesajn preparojn por utiligi Esperanton en turisma afero.

Nun la Esperanto-kurso vigle iras, kaj la 30 kursanoj, duono el kiuj estas interpretistoj kaj gvidistoj, energie lernas nian lingvon. Ili esprimas sian esperon ke pli kaj pli multaj fremdlandaj esperantistoj-turistoj venos al Ĉinio, kaj ili povos servi al la gastoj per Esperanto (plej bone en grupo).

ADRESO: S-ro Gong Peikang, Luxingshe, la Ĉina Internacia Vojaĝa Servo, 6 Orienta Chang-an-Strato, P. O. Kesto 1810, Beijing, Ĉinio.

ESPERANTO EN SIRIO

En la ĉefurbo Damasko studentoj kaj entuziasmaj interesitoj lernas la Internacian Lingvon. Adreso: M. Gassan T. Mausily, 7 Maussily Bldg., St. Omar Ibn Al-Kattab, Mal'ab, Hazra'ah, Damascus.

PLIA VERKO PRI ESPERANTO EN IRANO

Meze de junio pasintjare aperis en Teherano unu plia verko pri Esperanto en la persa lingvo "Morgaŭigo de Hodiaŭ". Ĝi temas pri longa intervjuo de ĵurnalisto kun D-ro Saheb-Samani. Li analizas Esperanton el psikologia, sociologia kaj lingvistika vidpunktoj.



S-ro Dalibor Brozoviĉ intervidiĝas kun Beijing-aj esperantistoj.

JUGOSLAVA AMIKO GASTIS ĈE NI

Invite de la Ĉina Sociologia Akademio, jugoslava esperantisto Dalibor Brozoviĉ, membro de la Jugoslava Scienca Akademio, lingvisto kaj profesoro de la filozofia fakultato de Zadar-universitato, vizitis Ĉinion. Je la 3-a de decembro 1979 li intervidiĝis kun Beijing-aj esperantistoj. S-ro D. Brozoviĉ kaj kamarado Ĉ. Ĉen rakontis respektive pri la jugoslava kaj ĉina Esperanto-movado. La Esperanta Sekcio de Radio Pekino intervjuis lin.

DONACO DE JEI — ALBUMO "HIROSIMA — NAGASAKI"

Lastatempe la Ĉina Esperanto-Ligo ricevis 50 ekzemplerojn de la nomita albumo kiel novjaran donacon de la Japana Esperanto-Instituto. La albumo rakontas per bildoj, kiel la atombomboj ruinigis la du urbojn en 1945 kaj kian tragedian travivaĵon spertis la japana popolo pro tio. Ĝi estas redaktita kaj eldonita de la Esperantista Societo por Hirosima — Nagasaki. Laŭ la propono de la japanaj amikoj ĈEL jam disdonis ilin al Esperanto-organizaĵoj kaj famkonataj esperantistoj de nia lando.

ESPERANTA REVUO "BONBELA" EL HINDIO

Lastatempe ni ĝoje ricevis Esperantan revuon unuafoje el Hindio. Ĝi estas internacia Esperanta magazino kvaronjara. Ŝajne, ĝi estas la unua tiaspeca revuo eldonata en Hindio. Pro tio estas gratulinde ĝin eldoni. Ĝia unua numero estas enhavoriĉa kaj kun diversaj temoj. Ĝin redaktas, presas kaj eldonas S-ro M. A. Vyas.



Albumo "Hirosima-Nagasaki"

LA 36-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

La nomita kongreso okazos en la finnlanda marista urbeto Rauma kun ĉ. 30,000 loĝantoj, dum 25 julio — 1 aŭgusto 1980. Kiel la kongresejo funkcios la modernaj konstruaĵoj de la urbaj civitana instituto kaj lernejoj. La dormejoj estos de la amasloĝeja tipo, sed por tiuj, kiuj postulas iom pli da komforto, la Landa Kongresa Komitato peras rezervojn por someraj hoteloj. Zorga preparado de la distraĵ, kulturaj kaj laboraj programoj jam komenciĝis. Kun la tuttaga ekskurso, variaj vesperaj aranĝoj ktp., la programo sekvas la ĝeneralan skemon de Internaciaj Junularaj Kongresoj, sed ia speciala finna kaj norda karaktero nuancos la internaciecon. Via aliĝo estas jam nun bonvena.

NOVA PERIODAĴO "EKONOMIA BULTENO PRI USONO"

La prospekto kaj provnumero de la nomita periodaĵo jam atingis nin. Ĝis nun en la mondo mankas al ni tiaj teknikaj kaj profesiaj eldonaĵoj en la internacia lingvo Esperanto. Ĉiu lando havas siajn periodaĵojn en tiu tereno, ĉiuj kompreneble en naciaj lingvoj. S-ro Thomas A. Goldman intencas eldoni la In-

ternacian Revuon pri Ekonomio kaj Komerco kun la enhavo el artikoloj kiuj estos kontribuitaj de profesiuloj, kompetentuloj ĉiuspecaj en ĉiuj partoj de la mondo, tial li bezonos kontribuadojn kaj sincere petas ilian kunlaboron al tiu celo. Ĝi akceptos ĉiajn artikolojn pri iu ajn aspekto de ekonomio aŭ komerco — pri ekonomia teorio, ekonomia analizado, ekonomia politiko, kaj tiel plu. La unua numero de la revuo aperos tuj kiam sufiĉa nombro da artikoloj estos ricevita kaj redaktita. Abonprezo de la bulteno: US\$8.00 por eksterlando kaj US\$4.00 por nordamerikaj adresoj. Abonadreso: 7008 Millwood Road, Bethesda, Md. 20034, Usono.

POSTKONGRESO EN OSLO 1980

La Norvega Esperantista Ligo invitas al postkongreso en la bela norvega ĉefurbo Oslo dum la tagoj 10-a ĝis 12-a de aŭgusto, 1980. La ampleksa programo de la 3-taga restado en Oslo rakontas pri allogaj ekskursoj al la vidindaĵoj de Oslo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Cetere okazos Distra Vespero kaj renkontiĝo kun norvegaj esperantistoj ĉe festena tablo. Limdato por aliĝo estas la 1-a de julio, sed ĉar la lokoj estas limigitaj, estas rekomendinde aliĝi laŭeble baldaŭ. Aliĝiloj riceveblaj de: Postkongreso

en Oslo, Boks 942, OSLO 1, Norvegujo.

UNUA TUT-AMERIKA ESPERANTO-KONGRESO

12.-15. 7. 1980, okazos la Unua Tut-Amerika Esperanto-Kongreso en la urbo San Luis, Argentino. Amerikanoj kaj neamerikanoj estas kore invitataj. La organizantoj entreprenis la starigon de aktuala impona ekspozicio por elmontri la eĥon de ĉi tiu evento en la tuta mondo. Tial la geesperantistoj de la tuta mondo estas petataj de nun sendi salutojn por la kongreso, preferinde per poŝtkartoj. Libro, revuoj, bultenoj en Esperanto estos bonvenaj, precipe se ĉi-lastaj enhavas anoncojn pri ĉi tiu kongreso. Adreso: 1-a Tut-Amerika Esperanto-Kongreso — Casilla Correo Central 289 — 2000 Rosario, Argentino.

ZAMENHOF SUR MONERO

Aperis en Varsovio la delonge anoncita monero honore al D-ro L. L. Zamenhof. Jen la detaloj: nominala valoro 100 zlotoj, pezo 16.5 gramoj, diametro 32 milimetroj, arĝenta, eldonkvanto 30,000 ekzempleroj. Sur unu flanko estas la pola blazono — aglo, sur la alia la portreto de la kreinto de Esperanto kaj surskribo: Ludwik Zamenhof, 1859 — 1917.

SALUTON AL LA NOVA ESTRARO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

William Auld estas elektita kiel nova prezidanto de la Akademio de Esperanto por anstataŭi Prof. Gaston Waringhien, kiu prezidis la Akademion de 1963 ĝis 1979 kaj multe kontribuis al la evoluado de la lingvo. Kiel novaj vicprezidantoj estas elektitaj Prof. D-ro Paul Neergaard kaj Prof. D-ro


Stojan Ĝuĝev, kaj D-ro Albert Goodheir fariĝis ĝia nova sekretario. William Auld estas mondfama verkisto en la Esperanta literaturo kaj rolas kiel vicprezidanto de UEA. Esperable, la Akademio de Esperanto, la gvida lingva institucio de la Esperantomovado, atingos rimarkindajn sukcesojn sub lia

prezido. La Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Redakcio de EPC, en la nomo de la ĉina esperantistaro, sincere gratulas kaj salutas la novan prezidanton kaj aliajn novajn estraranojn de la Akademio, dezirante al ili riĉajn rikoltojn en ilia laboro.

Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de E P Ĉ

Ma Yanhong, nova gimnastika stelo

de ZONG HE



Ma Yanhong en prezentado de arta gimnastiko

EN la 9-a de decembro 1979, oni unuafoje hisis la ĉinan kvinstelan ruĝan flagon kaj ludis la ĉinan nacian himnon en la sporthalo de la urbo Fort Worth, Usono, ĉar ĉina 15-jara gimnastino Ma Yanhong gajnis ĉampionecon de ŝtupa paralelo en la virina individua finalo per 19.825 poentoj en la 20-a Monda Gimnastika Ĉampioneca Konkurso. Tio estis la unua ora medalo ricevita de ĉina sportistino en tia konkurso. Ankaŭ M. Gnauk, gimnastino de la Germana Demokratia Respubliko, akiris la

saman titolon per la samaj poentoj.

La virinaj individuaj finaloj estis la lastaj sportludoj de la ĉampioneco. Kvankam unu enira bileto kostis 20 dolarojn, tamen neniu el la 12,000 sidlokoj en la sporthalo restis vaka.


Ma Yanhong sukcese plenumis siajn elektitajn relative malfacilajn movojn. Ŝi ricevis varman aplaŭdon precipe post kiam ŝi unue faris sur la stangoj surmanan staradon kaj 360-gradan korpoturniĝon kaj poste korpo-

svingon de la malsupra stango, 180-gradan turniĝon kaj surteriĝon kun antaŭentranskapiĝo kun kuntiritaj kruroj.

Kiam ŝi finis la tutan kompletan da movoj kaj firme staris kun levitaj manoj por fari signon al la juĝisto, eksplodis longa aplaŭdo tra la tuta halo. Kiam ŝi venis en la ripozan ĉambron, ŝi estis tuj ĉirkaŭita de spektantoj, kiuj faris gratulon kaj deziris al ŝi pli brilan sukceson en la venontaj Olimpiaj Ludoj de 1980.

Ma Yanhong estas la plej juna sportistino de la ĉina gimnastika teamo. Ŝi lerte faris ĉiun movon sur la ŝtupa paralelo. En ŝiaj movoj enkorpiĝis malfacileco, stabileco, beleco kaj originaleco. Ŝia korpo kun trajtoj de beleco estas tre esprimokapabla. Ŝiaj danĝeraj flugmovoj inter la du stangoj ĉarmis la spektantojn.

Ŝi estas lernantino de la Milita Sporta Instituto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Ŝi altas



Ma Yanhong en la konkurso de ŝtupa paralelo



Ma Yanhong skribas sian nomon por fremdlandaj ĵurnalistoj kaj amikoj.

je 1.5 metroj kaj pezas je 35 kilogramoj. En la internacia gimnastika invita konkurso okazigita en Shanghai (Ŝanhajo) en 1978, ŝi gajnis ĉampionecon per 9.95 poentoj kaj unuafoje montris sian eksterordinaran talenton. Poste ŝi partoprenis en la Oka Azia Sportkunveno en 1979 kaj atingis brilan sukceson. Dank' al sia ĉiutaga diligenta ekzercado ŝi havigis al si la gloran titolon de monda ĉampionino.

(Daŭrigo de p. 2.)

amikeco kun diverslandaj popoloj. Ankaŭ Sun Zhen'ou, estro de la Wuhan-a Esperanto-grupo, parolis en la kunveno. Nemalmultaj junaj esperantistoj esprimis sian decidemon diligente lerni Esperanton. Veterana esperantisto Li Jun kantis kanton "Flava Gruo Flugas super la Riverego" verkitan de li mem, en kiu li varme laŭdas eminentan kontribuon de Zamenhof por la homa idealo kaj prikantas la belan perspektivon de Esperanto kaj altan aspiron de esperantistoj. La instruisto kaj kursanoj ludis la drameton "Intima Intervidiĝo" verkitan de ili mem, kiu figure reaperigis la kortuŝan scenon, ke Wuhan-aj esperantistoj intervidiĝis kun fremdlandaj esperantistoj ilin vizitantaj kaj spegulis la rolon de Esperanto en akcelado de interkompreniĝo kaj fortigo de amikeco en internacia komunikiĝo. Kamarado Ikso deklamis sian poemon honore menciitan en la internacia konkurso de Esperantaj verkoj.

Enhavoriĉaj prezentoj ricevis varman manklakadon.

Chongqing (Ĉongking), la plej granda urbo en sudokcidenta Ĉinio, havas pli ol 160 esperantistojn kaj kursanojn. Ili okazigis memorkunvenon en la pitoreska Pipashan-parko. Li Wu, respondeculo de la prepara grupo de la Chongqing-a Esperanto-Asocio, faris paroladon en la kunveno. Li rememoris la historion de Esperanta movado de la nomita urbo kaj montris la direkton por Esperanto. Post

la kunveno oni sin amuzis per artaj prezentoj, kiel ĥoro, solkanto, danco kaj deklamo de poemoj de Zamenhof. Inter tiuj programeroj iuj estis verkitaj de kursanoj mem, kiel la kanto "Verda Stelo", aliaj estis preparitaj en mallonga tempo. Ili bele kantis "Haŭlistoj ĉe Volgo", "Sakurfloroj" kaj "Oceano" en Esperanto.

Ankaŭ Esperantaj organizoj de Chengdu (Ĉengdu), Guiyang (Gujjang) kaj aliaj urboj celebris la Esperantan feston.

Post celebra aktivado okazigita de la Hubei Esperanto-Asocio kaj Wuhan-a Esperanto-grupo



YANG DAWEN:

PRI LA REFORMO DE LA SISTEMO DE GEEDZECO KAJ FAMILIO EN ĈINIO

KIAM oni parolas pri geedzeco kaj familio, oni nature sentas intimecon kaj varmon. De antikveco neniu ne aspiras al bela geedzeco kaj feliĉa familio. Multaj fremdlandaj amikoj interesiĝas pri la geedzeco kaj familio en Ĉinio kaj deziras scii, kiel la ĉinoj traktas tiujn aferojn. Laŭ peto de la redakcio de "El Popola Ĉinio", ĉi-sube mi koncize parolos al vi pri la historio kaj reformo de la sistemo de geedzeco kaj familio en Ĉinio.

FEŬDISMA SISTEMO DE GEEDZECO KAJ FAMILIO

En la feŭda socio de miloj da jaroj la laboranta popolo, precipe la ĉinaj virinoj, estis rigore katenitaj de la nomita sistemo. Sub tia sistemo la virinoj en Ĉinio estis submetitaj al la dominado de kvar aŭtoritatoj, nome: feŭda politika aŭtoritato,

klana aŭtoritato, religia aŭtoritato kaj edza aŭtoritato. La ĉefaj karakterizaĵoj de tiuj aŭtoritatoj estis devigi virinojn al edziniĝo, respekti virojn kaj malestimi virinojn kaj neglekti la interesojn de la gefiloj. Laŭ la feŭda leĝo kaj etiko, estis neniam egala rajto inter la viroj kaj la virinoj, inter la edzoj kaj la edzinoj, inter la gepatroj kaj la gefiloj, inter la famiĉestro kaj la aliaj familianoj.

La feŭda geedzigo ne permesis liberan elekton al viroj kaj virinoj. La "volo de la gepatroj" kaj la "vortoj de la svatantoj" estis la laŭleĝa bazo por starigo de geedzeco. "Egaleco en socia kaj ekonomia stato" kaj donacaĵoj de fianĉo estis gravaj kondiĉoj por establo de geedzeco. Laŭ ĝeneralaj feŭdaj leĝoj de diversaj dinastioj en Ĉinio, la geedzigo estis decidita de la gepatroj aŭ geavoj, kaj la gefianĉoj ne povis koni unu la alian antaŭ la geedzigo, multaj el ili eĉ neniam intervidiĝis ĝis geedzigo, por ne paroli pri amo inter ili. La feŭda geedzeco estis tiu de poligamio, kaj la feŭda familio estis tiu, super kiu regis la edza aŭtoritato kaj en kiu la virino tute perdis sian sendependecon. En la familioj la virinoj devis obei siajn patrojn kaj post la edziniĝo ili devis obei sian edzon kaj post la morto de sia edzo obei siajn filojn. En certaj kondiĉoj viroj povis repudii sian edzinon, dum la virinoj ne havis la rajton forlasi sian edzon.

Kvankam aperis familioj kun burĝara geedzeco en iuj lokoj de la malnova Ĉinio post la Revolucio de 1911, tamen tra la tuta lando la familia sistemo de feŭda geedzeco postlasita de la historio ankoraŭ okupis regantan pozicion. Ĉie okazis laŭku-

time geedziĝoj laŭ la volo de la gepatroj kaj novedzinoj estis aĉetitaj kiel komercaĵoj, la humila pozicio de la virinoj en la familio restis senŝanĝa kaj en multaj lokoj ankoraŭ konserviĝis la malnovaj moroj teni infanĉinon aŭ knabinon por nenaskita edzo kaj malpermesi reedziniĝon de vidvinoj. Tia malracia kaj postĝinta sistemo senigis sennombrajn homojn je feliĉo kaj eĉ la vivo. Laŭ enketado en la Okcidenta Distrikto de Bejing (Pekino), en la strato Hengjie troviĝas 124 loĝantoj geedziĝintaj antaŭ la Liberiĝo, el kiuj 122 geedziĝis laŭ la volo de la gepatroj. Sur la duoninsuleto Xiaozha de la gubernio Hui-an, Fujian-provinco, 135 virinoj droniĝis sin en la maro pro kontraŭvola edziniĝo en 1947. Tiuj knabinoj, kiuj havis nenian eliron kaj ne volontis submetiĝi, staris kelkope sur alta krutaĵo kaj senespere rigardis la maron. Post adiaŭo unu al alia ili staris en rondo dorson ĉe dorso, kunligis siajn harligojn kaj kun forta indigno saltis en la maron. Kia tragika sceno!

BATALO POR ABOLI LA FEŬDAN SISTEMON DE GEEDZECO KAJ FAMILIO

En la malnova Ĉinio tiu sistemo ne nur katenis la vivon de la popolamasoj, sed ankaŭ malhelpis la socian progreson. Radikale reformi tiun sistemon estis unu el la gravaj taskoj ple-numendaj por la ĉina revolucio. En la proceso de la moderna ĉina revolucio, nemalmultaj progresemuloj montris la socialajn malbonojn en la sistemo de geedzeco kaj familio de Ĉinio kaj elmetis progresajn opiniojn.

Sed ĉiuj iliaj klopodoj finfine malsukcesis.

Dum la periodo de la Movado de la Kvara de Majo en 1919, la marksismaj pioniroj de Ĉinio alte taksis la liberigon de virinoj kaj reformon de la sistemo de geedzeco kaj familio, propagandante la revolucian teorion. Ili fortege atakis la feŭdajn malnovajn kulturon kaj moralojn kaj eksplikis la rilaton inter la proletara revolucio kaj la liberigo de virinoj kaj la reformo de la geedzeca kaj familia sistemo. Iuj progresemaj revoluciaj virinoj per siaj agadoj faris defion al la estiĝinta kaj putriĝinta geedzeca sistemo. Guo Longzhen, bravulino en la Movado de la Kvara de Majo, estis devigita fianĉiniĝi en sia juneco. En la geedziĝa tago ŝi sidis en la palankeno kun levita kurteno. Kiam la palankeno atingis la hejmon de la edzo, ŝi aplombe eniris, faris paroladon antaŭ la novedzo kaj gastoj, malkaŝante la krimon de la feŭda geedzeco kaj propagandante la superecon de la libera geedziĝo. Post la parolado, ŝi justoplene forlasis la domon de la edzo kaj poste iris al Tianjin por viziti lernejon.

Post 1921, la Komunista Partio de Ĉinio elmetis serion da revoluciaj opinioj koncerne la liberigon de la virinoj kaj reformon de la sistemo de geedzeco kaj familio. En novembro, 1931, en la Jiangxi-a revolucia bazloko la tiama Centra Plenuma Komitato de la Ĉina Soveta Respubliko aprobis kaj publikigis “la Regularon pri Geedzeco de la Ĉina Soveta Respubliko”. Ĝi estis ekstreme grava dokumento por la reformo de la sistemo de geedzeco kaj familio. La regularo difinis: “Preni liberalan

geedzecon kiel principon, aboli ĉiujn sistemojn de la feŭda kontraŭvola kaj komerca geedzeco kaj malpermesi tenadon de infanĉino” kaj “praktiki monogamion kaj malpermesi poligamion”. La difinoj de la regularo pri geedziĝo kaj eksedziĝo plenis je radikala kontraŭfeŭdisma spirito. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Popola Liberiga Milito ankaŭ ĉiuj liberigitaj regionoj publikigis nemalmultajn regionajn leĝojn pri geedzeco. Dank’ al la praktiko de nova geedzeca sistemo, multe reduktiĝis la nombro de la devigitaj kaj komercaj geedziĝoj. Mi prenu Jianping-gubernion de Hebeiprovinco kiel ekzemplon: En 1948, la procentaĵo de la devigitaj kaj komercaj geedziĝoj reduktiĝis de 95% ĝis 22%. La gejunuloj akiris la rajton de libera geedziĝo.

La fondiĝo de la nova Ĉinio kreis bonajn kondiĉojn por ĝisfunde aboli la sistemon de la feŭda geedzeco kaj familio kaj starigi la socialisman sistemon de geedzeco kaj familio tra la tuta lando.

En septembro, 1949, la Komunista Programo de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco eksplicite difinis, ke “la Ĉina Popola Respubliko abolas la feŭdan sistemon katenantan la virinojn. La virinoj ĝuas egalajn rajtojn kiel la viroj en politiko, ekonomio, kulturo, edukado kaj socia vivo. La geviroj rajtas libere geedziĝi.” Tiuj principoj estis adoptitaj ankaŭ en la postaj konstitucioj. En majo, 1950, la Centra Popola Registaro publikigis kaj ekpraktikis la Leĝon de Geedzeco de la Ĉina Popola Respubliko, kiu estis grava leĝo de la ŝtato por

reformi la sistemon de geedzeco kaj familio. Tamen, en lando, kiel Ĉinio, kie la feŭda ideologio profunde enradikiĝis, estis treege malfacile reformi tian sistemon kaj ne sufiĉis por tio nura publikigo de leĝo. Por malfermi vojon al la nova sistemo de geedzeco kaj familio, disvolviĝis la propaganda kampanjo por efektiviĝi la leĝon tra la tuta lando en 1953. La ŝtato trejnigis milionojn da bazaj kadroj kaj grandan nombron da propagandantoj kaj aktivuloj, disdonis dekmilionojn da presajoj kaj faris propagandadon kaj edukadon pri la leĝo al la tutlanda popolo. Samtempe, ni traktis malfacilajn kazojn de geedzeco starigitajn antaŭ la Liberigo, faris persvadon al tiuj geedzoj, kiuj ne kontentiĝis pri sia geedzeco, kaj liberigis la infanzinojn kaj kromedzinojn, kiuj estis turmentitaj de siaj edzoj kaj bopatrinoj. Dank’ al tiu kampanjo, la nombro de propravolaj geedziĝoj rimarkinde pliiĝis. Ĉie aperis novaj moroj kaj moraloj, kiaj nova geedziĝa ceremonio, egaleco inter geedzoj kaj harmonio en la familio.

Laŭ statistiko pri 11 grandaj urboj farita en la unua duonjaro de 1954, la nombro de tiuj, kiuj estis permesitaj geedziĝi laŭ la leĝo, konsistigis 97.6% de la totala nombro de la permesopetantoj. La nombro de tiuj, kiuj estis malpermesitaj pro devigiteco kaj aliaj kialoj, konsistigis nur 2.4%. Laŭ statistiko pri 27 provincoj kaj municipoj farita en 1959, 95% de la gejunuloj, kiuj petis permeson geedziĝi, estis konformaj al la postulo de la leĝo. Tial ni povas aserti, ke la feŭda sistemo de geedzeco daŭrinta en Ĉinio pli ol 2,000 jarojn estis fundamente frakasita.

NOVA SISTEMO DE GEEDZECO KAJ FAMILIO

Por ke eksterlandaj geamikoj havu ĝeneralan konon pri la nova sistemo de geedzeco kaj familio de Ĉinio, mi iom parolu pri la ĉefaj enhavoj de la socialisma sistemo de geedzeco kaj familio, en ligo kun la principoj de la leĝo.

Unue, la sistemo de geedzeco kaj familio en la nova Ĉinio estas bazita sur libera geedzeco, inkluzive de la libero en geedziĝo kaj tiu en eksgeedziĝo. La kondiĉoj de geedziĝo estas: A. geedziĝi kun plena interkonsento de la geviroj; B. Observi monogamion; C. Esti en geedziĝa aĝo; D. Ne havi sangrilaton nekonvenan por geedziĝo; E. Ne havi fiziologian difekton aŭ malsanon nekonvenan por geedziĝo. La proceso de geedziĝo estas: La geviroj, kiuj volas geedziĝi, registras sin ĉe loka koncerna instanco, kaj tiuj, kiuj konformas al la suprediritaj kondiĉoj, povas ricevi geedziĝan legitimajon. Estas malpermesate praktiki bigamion, havi kromedzinon kaj teni infanfanĉinon; estas malpermesate malhelpi vidvinon en ŝia reedziniĝo; kaj estas malpermesate al ĉiu ajn ĉantaĝi per geedziĝo. Ĉio ĉi tio havigis efikajn garantiojn en leĝo por la libero en geedzeco. Krom la diritaj kondiĉoj, multaj gejunuloj elektas por si edzon aŭ edzinon kun komuna idealo kaj pura amo.

Laŭ tiu leĝo, la minimuma aĝo por edziĝo estas 20 jaroj kaj tiu por edziniĝo 18 jaroj. Tamen, kun la disvolviĝo de la socialisma konstruado, praktikado de naskolimigo kaj la altiĝo de la politika konscio kaj klereco de la vastaj amasoj de gejunuloj,

konforme altiĝi la aĝojn por geedziĝo fariĝis konsekvenca tendenco. Kaj en la nuna tempo, la aĝoj por geedziĝo de la gejunuloj en la kamparo ĝenerale estas: 25 jaroj por viro kaj 23 jaroj por virino; en la urboj la aĝoj estas iom pli grandaj ol tiuj en la kamparo. Fakte, konvena altiĝo de la aĝoj por geedziĝo utilas por la laboro kaj studo de la gejunuloj, por ilia ĝuado de la memdecida rajto de geedzeco surbaze de ilia solidiĝo en ideologio, kaj ankaŭ por naskolimigo. La alvoko de nia ŝtato pri konvena altiĝo de la aĝoj por geedziĝo jam ricevis konscian respondon de la plejmulto de la gejunuloj.

Koncerne la eksedziĝon, se gedztoj volas eksedziĝi, ili povas plenumi la eksedziĝan proceson ĉe loka instanco. La loka instanco donas al ili eksedziĝan legitimilon, se ĝi konstatis post esplorado, ke la gedztoj efektive volas eksedziĝi kaj faris konvenan aranĝon pri siaj gefiloj kaj havaĵoj. Se unu el la gedztoj insiste petas eksedziĝi kaj la alia ne konsentas tion, la loka instanco klopodas por pacigi ilin kaj ili mem povas fari eksedziĝan proceson rekte al popola juĝejo, por ke la lasta traktu la aferon kaj faru verdikton. La lasta unue faras pacigan laboron. Se tio ne donas efikon, la popola juĝejo faras sian verdikton laŭ la kazo kaj la koncernaj artikoloj de la leĝo. Kontraŭe al la fakto, ke en iuj landoj rapide altiĝas la procentaĵo de eksedziĝo, la plej multaj kazoj de geedzeco de la ĉina popolo estas solidaj kaj Ĉinio estas unu el la landoj kun plej malalta procentaĵo de eksedziĝo en la mondo.

Alia principo de la sistemo de geedzeco kaj familio en la nova

Ĉinio estas monogamio. Estas malpermesate samtempe havi du edzojn aŭ edzinojn. Malobservanto de tio estas punata.

La principo de egalrajteco por la viroj kaj virinoj okupas gravan lokon en la sistemo de geedzeco kaj familio de Ĉinio. La leĝo difinas, ke la gedztoj havas egalan rajton en la familio. Ili havas la rajton uzi sian nomon kaj la liberon elekti por si profesion kaj partopreni en laboro kaj en socia aktivado. Ili ambaŭ havas devon kaj rajton vivteni kaj eduki siajn gefilojn, egalan proprieton de la havaĵoj kaj la rajton heredi unu de alia havaĵojn.

Ankaŭ estimi la maljunulojn kaj bone zorgi la infanojn kaj protekti la laŭleĝajn rajtojn de la virinoj kaj infanoj estas gravaj principoj en la sistemo de geedzeco kaj familio de Ĉinio. En Ĉinio la gepatroj havas devon vivteni kaj eduki siajn gefilojn, kaj la lastaj havas devon vivteni kaj helpi la gepatrojn. Estas malpermesate turmenti gepatrojn aŭ gefilojn. La ŝtato agnoskas kaj protektas la laŭleĝan adoptadon. La difinoj pri la rilato inter la gepatroj kaj gefiloj validas ankaŭ por tiu inter adoptinto kaj adoptito. Ankaŭ la bastardoj kvankam malmultaj ricevas bonan protektadon de la leĝo kaj ĝuas egalajn rajtojn same kiel ĉiuj aliaj infanoj, kaj ĉiu ajn estas malpermesata atenci kaj malestimi ilin. Pro diversaj kialoj kaŭzitaj en la historio, en la aktuala vivo troviĝas ankoraŭ certaj diferencoj inter la viroj kaj virinoj, kio estas neevitebla en certa periodo de historio. Tial, en la Leĝo de Geedzeco de la Ĉina Popola Respubliko estas multaj artikoloj, kiuj speciale favoras al la

virinoj en eksedziĝo, koncerne al vivtenado kaj edukado de gefiloj, kaj aranĝo de havaĵoj kaj vivo post la eksedziĝo.

La granda ŝanĝiĝo en la sistemo de geedzeco kaj familio profunde komprenigis la ĉinan popolon, ke ilia feliĉa vivo estas nedisigebla de la sorto de la patrolando kaj la socialisma konstruado.

En la 30 jaroj post la Liberiĝo la laboro por reformi la sistemon de geedzeco kaj familio akiris grandan sukceson. Tamen, Ĉinio estas lando longe suferinta de feŭda regado kaj ankaŭ lando rekte enirinta la socialisman revolucion post la venko de la demokratia revolucio. Tial ankoraŭ troviĝas restaĵoj de malnovaj ideologio kaj reĝimo en la kampo de geedzeco kaj familio neelimineblaj en mallonga tempo. Precipe en la tempo, kiam Lin Biao kaj la "kvarpersona bando" praktikis ultra-maldekstran linion, ili senbride subfosis la nacian ekonomion kaj tretis la socialismajn leĝojn, kio alportis multe da malbonaj influoj al la vivo de la familioj kaj geedzeco, kiaj reapero de malnovaj moroj, restariĝo de devigita kaj komerca geedzeco en montvilaĝoj kaj ĉantaĝo sub preteksto pri geedzeco. Post la faligo de la "kvarpersona bando", sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro, la koncernaj organizaĵoj, inkluzive de sindikatoj, la Komunisma Junulara Ligo, la Virina Federacio kaj aliaj amasaj organizoj, faris grandskalan propagandadon kaj edukadon kaj la situacio pliboniĝis multe, kaj la reformado de nia sistemo de geedzeco kaj familio denove suriris la vojon de sana disvolviĝo.

ZHANG LIHAN:

KIAL MI AMAS LIN?

MI estas laboristino de la Beijing-a Unua Gaŭĝa Fabriko. La amo inter mi kaj mia edzo antaŭ la geedziĝo estis ordinara, sed spertis multajn malfacilaĵojn. Mi iam afliktiĝis kaj larmis pro tio. Nun kvankam mi ĝuas feliĉan familian vivon, tamen mi ofte rememoras la pasintaĵojn. . .

En mia aĝo de 23 jaroj, mi kaj aliaj kelkaj kamaradoj estis komisiitaj de la fabriko helpi iujn postiĝintajn laboristojn. Juna laboristo Wang Zhengguang gvidis tiun laboron. Tiam ni ofte kune diskutis problemojn. Li estis afabla, aplomba kaj sagaca, per tio li vekis mian atenton kaj eĉ admiron. Mi do konscie komencis lerni de li. En kunestado kun li, mi trovis ke mia laborkapableco leviĝis certagrade.

Nur kiam ni kunestis, mi ĉiam lin atentis. Iufoje, mi kaj li eliris pro oficlaboro. Ni ascendis aŭtobuson ĉe la unua stacio kaj sidiĝis sur dusidlokan seĝon. Mi estis ĝoja en la koro, ke en tiu antaŭurba aŭtobuso ni povos sidi kune por pli longa tempo. Sed je la dua stacio, virino kun bebo en la brakoj ascendis la aŭtobuson kaj estis for de ni je kelkaj seĝoj. Kiam mi hezitis ĉu mi cedos mian sidlokon al ŝi, li jam stariĝis kaj helpis la virinon sidiĝi en lian sidlokon. Tiam mi honte ĵetis al li respektan rigardon, sed tio estigis ĉe li nenian reagon. Tiu bagatelaĵo impresis min tre profunde.

Iun tagon, post la labordeĵoro, mi kaj li iris hejmen kune. Survoje li multe parolis pri nia postiĝinta tekniko de frida kapoformigo kaj pri la devo de revoluciaj junuloj. Li diris: "Ni gejunuloj devas glorigi la patrolandon per nia ago. Al nia lando mankas libroj sisteme eksplikantaj la teknikon de frida kapoformigo. Mi volas prove skribi tian libron." "Vi volas skribi libron?" demandis mi kun miro kaj ekscito. Li estas filia komitatano de la Komunisma Junulara Ligo kaj skipestro, ĉiam prenas sur sin pezan laboron kaj diligente lernas teknikon en la produktado. Ĉio ĉi tio estas konita de mi. Estis ekster mia atendo, ke li — abituriento — nun havas eĉ tiel grandan ambicion verki libron! Mi pretervole ĵetis al li rigardojn kaj decidis fariĝi lia helpanto.

De tiam, preskaŭ ĉiutage post la labordeĵoro ni renkontiĝis ĉe la pordo de la fabriko kaj ni babilis pri ĉio sur la hejmenrevena vojo. Kaj la vojo de la fabriko ĝis la hejmo ŝajnis al ni tro mallonga. Post ĉiu disiĝo, rigardante lin foriranta en vestoj senkoloriĝintaj, mi pensis en la koro: Li vere estas aminda junulo!

Iun vesperon, li subite venis en mian hejmon. Ne sciante ĉu pro longa atendo aŭ pro aparta ĝojo, mi sentis mian koron forte batanta kaj mi trovis neniun konvenan vorton. Fine, li unue rompis la silenton kaj diris bagatelan akcidenton okazintan en



*Zhang Lihan transskribas por sia edzo
"Fundamenton de Frida Kapoformigo".*



En parko

la fabriko. En liaj balbutaj kaj nenaturaj paroloj mi divenis, ke li venas evidente ne pro tio. Per alia paroltemo mi sukcese eltiris lin el la embaraso kaj ni interparolis multe. Sed ni ambaŭ sentis, ke aliflanke de tiuj paroloj kaŝiĝas malfacile eldireblaj vortoj. Sub la luno mi akompanis lin ĝis ekster la pordo. Tiam okazis inter ni longa silento neniam aperinta. Je la disiĝo, li forte premis mian manon, dirante: "Malgranda Zhang, estu mia fianĉino, ni certe vivos feliĉe." Rigardante liajn honestajn atentantajn okulojn tra la heleta lunlumo, mi sentis la vangojn arde flamiĝantaj kaj kapjesis malpeze. De tiam mi sentis ke io nova venis en mian vivon.

Post unu jaro, mia pliaĝa fratino trovis foton de Wang en mia taglibro kaj malkaŝiĝis la sekreto. Tiun vesperon mia patrino demandis min ĉu mi havas amaton. Kun dolĉa sento mi ĉion konfesis. Neatendite, la vizaĝo de panjo tuj malsereniĝis kaj ŝi ne permesis al mi daŭre konservi rilaton kun

Wang, kiam ŝi informiĝis, ke Wang havas nealtan salajron kaj devas vivteni siajn gefratojn.

En la nokto, kuŝante sur lito mi neniel povis endormiĝi kaj la larmoj malsekiĝis la kapkusenon tukon. La vortoj de mia patrino profunde pikis mian koron. En la mondo patrino ĉiam zorgas sian filinon, ĉu vere mi eraras en tio? Mi hezitis inter la patrino kaj amato kaj provis ŝanĝi sian malnovan penson.

Rigardante la arkan lunon ekster la fenestro, mi rememoris multajn pasintajn tagojn: Iun somermezan vesperon, en lia ĉambreto estis tiel varme, kiel en vaporumilo, sed li daŭre laboris super sia verkado. Liaj vestoj malsekiĝis de ŝvito. Ĝuste en tiu ĉambreto, kiom da vesperoj ni ambaŭ pasigis. Mi transskribis por li la manuskripton kaj faris desegnojn. Ni ĝuis la feliĉon de amo en signifoplena komuna laboro. Kiel ni povus disiĝi?

Miaj gepatroj estas intelektuloj kulturitaj de la nova Ĉinio.

Mia patro estas mekanika inĝeniero kaj mia patrino medicinistino. Kial la patrino ankoraŭ havas feŭdan penson? Ĉu ankaŭ la patro havas la saman penson? Ĉu mi devas submetiĝi al la postiĝinta moro kaj malnova penso kaj rezigni mian puran kaj honestan amon? Ne! Mi devas akiri subtenon de mia patro kaj ŝanĝi la penson de mia patrino. Mi devas persisti en la rajto pri amo!

Post nelonge, mia patro revenis de alia loko. Por ke li bone konu malgrandan Wang, mi maltrankvile donis al li volvon da planoj faritaj de Wang por ekzameno. Mia patro atente rigardis kaj laŭdis: "Bone, bone." "Eble li iam vizitis fakan lernejon?" "Ne, li memlernis." "Multesperiga junulo, invitu lin en nian hejmon." Aŭdinte la vortojn, mi sentis, ke falis la ŝtono sur mia brusto kaj mi ĝojiĝis en la koro. Mi sciis, ke mia patrino eble ŝanĝos sian opinion pri malgranda Wang, se nur mia patro ŝatas lin.

Post kelkaj tagoj, malgranda Wang venis kun la manuskripto

de la ĉapitroj 1 kaj 2 de "Fundamento de Frida Kapoformigo". Rimarkinte, ke ĝi estas transskribita de mi, mia patro ŝajne komprenis ĉion kaj ĵetis al mi kontentan rigardon. Kiam malgranda Wang rakontis al li sian verkan procedon, mia patro estis absorbata. Videble li estis kortuŝita de la diligenta memlernado de Wang. Mia patro donis siajn opiniojn pri lia verko, donacis al li desegnilaron aĉetitan de li antaŭ pli ol dek jaroj dum studo en Svisio kaj kuraĝigis lin plu diligente studi la teknikon. Dank' al la subteno de mia patro mia patrino iom post iom ŝanĝis sian sintenon. De tiam mi kaj malgranda Wang kunestis pli ofte.

Nia rilato malkaŝiĝis en la fabriko. Iuj homoj duonŝerce kaj duonmoke diris: "Malgranda Wang estas malordemulo, dum Lihan bela kaj saĝa, kaj krome ŝia patro estas inĝeniero. Ili estas netaŭga paro kaj certe disiĝos." Jes, malgranda Wang ne estas tre bela, tamen la "beleco" de animo estas pli valora ol tiu de aspekto. Li havas koron bonan, puran kaj fidelan kaj socialisman konscion. Tian homon mi ja devas ami.

Por verki "Fundamenton de Frida Kapoformigo", li legis "Metalografion", "Teorion pri Meĥaniko", "Pri Prilaborado de Metal per Premo" kaj memlernis la japanan lingvon, kaj ofte pasigis sian libertempon en biblioteko. Mankis al li la tempo por aranĝi la ĉiutagan vivon. Li tiel absorbiĝis en sia verkado, ke li eĉ forgesis manĝaĵon sur fajro kaj ofte devis manĝi rizajon karbiĝintan. Tio min tre kortuŝis kaj doloris.

Malgraŭ ĉiaj onidiroj, mi prenis, antaŭ la geedziĝo, sur min la devon de edzino kaj aranĝis por li la ĉiutagan vivon: prepari manĝaĵon, lavi vestojn, purigi kaj ordigi lian ĉambron. Iam mi eĉ donis al li monhelpon, kiam li renkontis malfacilojn en la vivo. Iun fojon, li pasie rigardis min, tuj poste brakumis min forte kaj emocie diris: "Lihan, kiel bone vi traktas min!" Tio neniam okazis antaŭe.

La vivo ĉiumomente provas la volon de homoj kaj ankaŭ la amon. Pro troa laciĝo Wang estis trafita de stomaka malsano. Lia malsano fariĝis ĉiam pli serioza kaj eĉ lia fekaĵo entenis sangon. Li vizitis hospitalon en mia akompano. Kuracistoj trovis niĉan ombron en lia stomako kaj asertis, ke tiu kazo ne ekskluzivas malignan malboniĝon. Ĉu li suferis de kancero? Mi ne povis elteni tiel pezan baton kaj nedeteneble ekploris en la hospitalo.

Mi klare komprenis, kion signifas kancero. Ĉu la ĵus burĝonanta floro de amo sufokiĝos de la kancero? Hejmen reveninte, mi ploregis en la sino de la patrino, kaj ŝi konsolis min. Mi maldormis nokte. Spertinte akran doloron, mi fariĝis firma kaj decidis helpi lin en batalo kontraŭ la malsano. Ĉiufoje mi akompanis lin por viziti hospitalon. Mia patro petis sian intiman amikon fakulon en kancera esplorado helpi en kuna diagnozo; mia patrino priserĉadis popolajn receptojn por li; la gvidantoj de lia fabriko kaj liaj kolegoj montris grandan prizorgon al li kaj petegis la hospitalon ĉiamaniere savi lin.

Li estas firmvola homo. La malsano ne nur ne deprimis lin,

sed male, li fariĝis pli diligenta. Li diris: "Mi nepre devas fini la verkon antaŭ la difuziĝo de la kancero." En tiuj tagoj, kun larmoj en la okuloj mi transskribis lian manuskripton ĝis profunda nokto, atendante verdikton pri morto aŭ vivo rilate al li. Post pli ol 20 tagoj malfacile pasigitaj, kuracistoj fine faris diagnozon, ke lia malsano ne estas stomaka kancero. Prenante la diagnozan slipon mi emociiĝis ĝis larmoj.

En 1975 mi edziniĝis kun Wang. Aprile de 1978, antaŭ la Tutlanda Scienca Konferenco, lia verko "Fundamento de Frida Kapoformigo" kun 160,000 ĉinaj ideogramoj estis finita. Ĝi estis malgranda kontribuo de ni al la patrolando kaj ankaŭ kristaliĝo de nia amo.

Jam forpasis kvin jaroj post nia geedziĝo, kaj nun ni havas amindan bebon. Ĉiutage, ni portas ĝin al la infanvartejo de la fabriko, kaj poste kune iras al laboro. Antaŭ nelonge, li estis postenigita al la Beijing-a Sesa Gaŭĝa Fabriko kiel teknikisto kaj fariĝis pli okupata. Sed li ĉiam helpas min en dommastumado. Kiam mi ripozis post nokta skipo, li faris ĉion inkluzive de zorgo pri la infano, lavado de vestoj kaj preparado de manĝaĵoj. Nia malgranda familio ĝuas feliĉan vivon: Post vespermanĝo ni promenas kun nia infano en la apuda Longtan-parko, aŭ rigardas televidajn programerojn, aŭ aprecas muzikon. Post endormiĝo de la infano, ni lernas la japanan lingvon unuhore aŭ legas ion alian.

Zhengguang ĉiam estas milda. Ni amas unu la alian, kaj neniam kverelis. Ni estas tre kontentaj pri nia familio.

Inĝeniero

Zhan Shuquan

Fotoj de QUAN YUXI

Nova ponto super Changjiang-rivero en Chongqing (Ĉongking) de Sichuan-provinco estas en konstruado. Tiu ponto kunligos la urbon kun la suda bordo de la riverego, tiel ke la Sichuan-Guizhou-a Ŝoseo povos rekte transpasi la torenton.



La ĉefinĝeniero de tiu ponto estas Zhan Shuquan, kiu sin okupis pri projektado de konstruaĵoj dum dekoj da jaroj kaj faris sian kontribuon al la konstruado de pontoj de nia patrolando. En la pasinta jaro li estis elektita kiel labor-modelo de Sichuan-provinco.



Zhan Shuquan sur konstruejo

Interkonsiliĝo kun laboristo pri konstrua tekniko






Prezentado pri la konstruado de la ponto al vizitantoj

Konstruado rigore konforma al la projekto


Kontrolado





Interkonsiliĝo pri konstruado de pontkapo





foiro

Foto de SUN YIFU

Kiel oni traktas kazojn de eksedziĝo?

GEEDZOJ en harmonio feliĉigas sian familion, dum malharmonio kaŭzas ĉagrenon kaj doloron aŭ eĉ disiĝon de la familio. La elcento de eksedziĝo en Ĉinio estas malalta, kaj tio vekis mian intereson.

Antaŭ nelonge mi vizitis la Popolan Juĝejon de la Okcidenta Distrikto de Beijing (Pekino). Min akceptis la maljuna juĝisto Qiao Fangnan, kiu okupiĝis pri juraj aferoj pli ol 20 jarojn. En 1953 li eklaboris en juĝejo, komence kiel skribisto, poste kiel asistanta juĝisto kaj pli poste kiel juĝisto. En civilaj kazoj, precipe en traktado de eksedziĝo, troviĝis multaj malfacile solveblaj problemoj, tamen li ilin solvis ĉiam pacience kaj racie, tial li ricevis laŭdojn de la popolo. Li rakontis al mi, kiel la popola juĝejo traktas tiajn kazojn.

Li diris, ke tiajn kazojn ofte unue akceptas kaj traktas la edziĝo-servo de la loĝkvartala komitato (plej baza popola registaro en urbo). Kiam la inter-

pacigaj klopodoj ne sukcesas kaj la edzo aŭ edzino insiste petas apelacii al la popola juĝejo, la lasta konsentas akcepti la kazon. La juĝejo traktas tiajn kazojn tre atenteme. Por bone trakti ĉiun kazon, estas starigita kolegia juĝistaro el juĝisto (aŭ asistanta juĝisto) kaj du asesoroj. Skribisto faras protokolon. Ili faras enketon pri la afero inter koncernaj civitanoj, persvadas kaj interpacigas, por ke la geedza paro ree vivu en harmonio. Ili opinias, ke estas ne facile fondi familion, kaj tial ili laŭeble faris interpacigojn al tiuj, kiuj geedziĝis antaŭ multaj jaroj, kunvivis akorde, longe kaj cetere havas infanojn. Dank' al siaj klopodoj ili rikoltas bonajn rezultojn. Pri tio Qiao Fangnan rakontis al mi la jenon:

Xu Cunhui, 33-jara, estas laboristino de la Vestofabrika de la Okcidenta Distrikto. Pro hejmaj aferoj ofte okazis kvereloj inter ŝi kaj ŝia edzo Qin Jiang. Foje, en kverelo Qin batis ŝin en ĉeesto de najbaroj.

Ŝi tre koleris kaj englutis 30 dormigajn tablojdojn. Tion rimarkinte ŝia edzo reveninta de noktoskipo tuj sendis ŝin en hospitalon. Tiu okazaĵo akriĝis ilian kontraŭdiron. Post kiam ŝi saviĝis, ŝi apelaciis al la juĝejo, ke ŝi petis nuligi geedzecon kun Qin. Qiao Fangnan, kiu respondecis pri tiu kazo, zorgeme analizis ŝian akuzon kaj vizitis iliajn najbarojn kaj fabrikojn. Post tio Qiao sciĝis, ke Qin Jiang perdis la gepatrojn en sia infaneco kaj lin vivtenis lia plejaĝa frato. Qin estas honesta, neparolema, flamiĝema kaj iom kruda en temperamento, dum lia edzino havas distingiĝan personecon kaj estas arbitra. Ĉiufoje, kiam la geedzoj kverelis, la edzo estis malpli elokventa ol la edzino kaj kolere pugnobatis ŝin. Xu Cunhui, solfilino dorlotita dum sia infaneco, neniel povis toleri tian ofendon kaj jen kial ŝi volis sin mortigi. Post enketo Qiao Fangnan trovis, ke la geedza paro longe amis unu la alian kaj tre amas sian solfilinon, kaj konkludis, ke ili povos reunuiĝi se Qin Jiang plu ne batos ŝin. Por repacigi tiun familion, li vizitis la fraton de Xu, ke li admonu sian fratinon al paciĝo, kaj plurfoje interparolis kun Qin, ke li bone konu sian eraron en traktado de la familia problemo. Sed liaj unuaj klopodoj estis preskaŭ vanaj, tamen li ne perdis kuraĝon. Li daŭre faris klopodojn por komprenigi ilin, ke la geedza rilato devas esti bazita

La Popola Juĝejo de la Okcidenta Distrikto de Beijing traktas kazon de eksedziĝo.





Juĝisto Qiao Fangnan (la dua de maldekstre) pacigas la geedzojn.

sur reciproka respekto kaj zorgado kaj egalrajteco, kaj la virino ne estas dependaĵo de la viro. Li montris serioze, ke bati homon estas ago atencanta la homan rajton kaj serioza atenco estos punata. Li ankaŭ klarigis al ili, ke eksedziĝo malutilos al la eduko de infano kaj la vivo de la familio. Qin Jiang fakte ne volis disiĝi de sia edzino kaj Xu Cunhui tre amasian filinon. La senlacaj admonoj de Qiao Fangnan kortuŝis ilin. La interpacigo sukcesis premise, ke Qin Jiang ne plu batos sian edzinon. Kaj ĝis nun ne okazis inter ili kverelo aŭ interbato.

La popolaj juĝejoj tre atente traktis tiajn kazojn kaj reakordigis multajn disiĝontajn familiojn, tiel ke la elcento de eksedziĝo multe reduktiĝis. Laŭ statistiko, la elcento de eksedziĝo en 1976-1978 estis 1.5% 13,316 paroj edziĝis kaj 203 paroj eksedziĝis), kaj tiu en la pasinta jaro reduktiĝis ĝis 0.6%.

Eksedziĝo en Ĉinio, sendube, estas libera. La juĝejo sankcias la eksedziĝon de tiuj paroj, kiuj geedziĝis antaŭ ne tre longe,

havis malfirman bazon de amo kaj ankoraŭ ne povis kunvivi post interpacigado. Rilate al tiuj eksedziĝo-petantoj kiuj malobservas la Geedziĝan Leĝon, la juĝejo certe metos tiujn antaŭ tribunalon, antaŭ ol sankcii ilian eksedziĝon. Mi estis invitita al publika juĝado de la kazo de eksedziĝo de Jia Aiping, laboristino de la Xinhua-a Presejo de Beijing, kaj Shen Jiaxiang, kuracisto de la sama fabriko.

La tribunalo estis starigita en la halo de la fabriko. Qiao Fangnan funkciis kiel juĝisto, helpate de du asesoroj kaj unu skribistino. Ĉeestis reprezentantoj de la laboristoj. Qiao proklamis la komencon de la proceso. Unue la akuzanto Jia Aiping parolis, kial ŝi petis eksedziĝon, kaj poste la akuzito Shen Jiaxiang faris ekskuzon. Antaŭ tio la juĝistaro jam faris detalan enketon pri tiu kazo kaj tial bone konis la aferon.

La patro de Jia Aiping laboras eksterlande. Ŝia familio kun malmultaj membroj estas bona. Shen Jiaxiang trompakiris ŝian amon per diversaj artifiko. Li avidis ŝiajn riĉaĵojn, sed ne

kore amis ŝin, kiu estas du jarojn pli aĝa ol li. Post edziĝo li ne atingis la celon kaj komencis turmenti ŝin. Ekzemple, li malpermesis al sia edzino partopreni en socia aktivado de la fabriko, ne lasis ŝin viziti la televizion universitaton kaj precipe malpermesis al ŝi havi kontakton kun aliaj viroj. Iutage Jia Aiping ripozis en sia hejmo malsana, kaj ŝia patrino venis kun sia nevo por viziti ŝin. Kaj post tio Shen montris grandan malkontentecon kaj insultis ŝin: "Vi jam havas edzon, kial vi manĝis ankoraŭ kun aliaj viroj ĉe sama tablo?" Multaj similaj maljustaĵoj de Shen faris ilian kunvivadon neebla. Kaj en tia medio Jia Aiping apelaciis al la juĝejo kun peto pri eksedziĝo.

Antaŭ la tribunalo Shen sin defendis per diversaj sofismaĵoj. Iuj reprezentantoj refutis lian paroladon, montrante, ke la Geedziĝa Leĝo eksplicite kondiĉis, ke la geedzoj estas egalrajtaj kaj havas la rajton partopreni en laboro aŭ socia aktivado. Post ilia kritiko Shen ekkonsciis sin erara.

Fine, en la nomo de la tribunalo Qiao deklaris la verdikton: "Ĉar Jia Aiping kaj Shen Jiaxiang malhavas solidan fundamenton de geedzeco kaj amon inter si, ni konsentas la nuligon de ilia geedzeco." Krome la tribunalo ankaŭ faris racian decidon pri la posedeco de ilia filineto kaj la havaĵo.

La ĉeestantoj aprobis tiun juĝon. Iu maljuna laboristo diris: "Bona estas la publika juĝo, ĉar ĝi edukis kaj la akuziton kaj nin ĉiujn." Iu juna laboristino diris: "La geedziĝo ja devas esti traktata kun granda seriozeco!"



EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ

MONGOLA GEEDZIĜA CEREMONIO

de ZHONG ZHI

EN aŭgusto de 1979, mi havis la honoron esti invitita al geedziĝa soleno de paro da mongolaj junaj gepaŝtistoj. Kvankam jam forpasis pluraj monatoj, tamen tiu interesa geedziĝa soleno kun aparta nacia koloro ankoraŭ restas freŝa en mia memoro.

Estis serena mateno. Ni veturis per aŭto al Ordos-stepo en la okcidenta parto de Interna Mongolio. Sur la vasta verda herbejo dise brilis diverskoloraj floroj kaj milda venteto disportis agrablan aromon. Fore ĉe la horizonto kuŝis lago simila al spegulo inkrustita en la verdejo. Sovaĝaj anasoj kaj anseroj, gruoj kaj ardeoj svingadis siajn flugilojn sur ĝia akvo kvazaŭ belaj dancantoj; sur la bordo kviete paŝtiĝis perlaĵ ŝafoj kaj buntaj gregoj de bovoj, ĉevaloj kaj altaj kameloj, el kiuj iuj trinkis el la lago, aliaj petole galopis unu post alia. Ĉio tio faris tiun verdan mondon viveplena.

Je vespera krepuskiĝo, ni venis al Hatu-taĉmento de la popola komunumo Chab kaj estis kondukita en la jurton de la edziniĝonta fraŭlino. La geedziĝa ceremonio okazos en la sekvanta tago, kaj tiuvespere ŝia familio havis multajn gastojn, kiuj venis por gratulo. Informiĝinte, ke ni venis de Beijing (Pekino), onklo Hungjĝing, kiu respondecis pri gastigado, forte ekscitiĝis. Li tuj ordonis al du knabinoj prezenti al ni buteron, fromaĝon, laktoteon, bakitan rizon kaj tre

bongustajn bakitajn farunaĵojn. Post la manĝeto, knabino prezentadis al ni laŭ loka kutimo vinon, ĉiufoje tri glasojn sur pleto, kaj ŝi senĉese riverencis al ni, ĝis ni eltrinkis la vinon.

Dum la trinkado, onklo Hungjĝing ĝoje rakontis al ni la mongolan tradicion de geedziĝa soleno sur Ordos-stepo. Li diris, ke tiu kutimo kun aparta stilo de nordaj nomadoj kaj forta vivetoso jam havas historion de pli ol 700 jaroj. Dum la tuta geedziĝa soleno, prezentiĝas ĉarmaj popolkantoj, belaj dancoj kaj aroma vino, kiuj bone montras lertecon de la mongola popolo en kantoj kaj dancoj kaj ĝian bravecon kaj revemon. Hodiaŭ, oni jam eliminis la superstiĉaĵojn el la ceremonio tradicia kaj konservas ĉion sanan kaj belan. La maljunulo diris al ni, ke en la malnova socio, la paŝtistoj geedziĝis nur laŭ la volo de la gepatroj, kaj la nobeloj kaj princoj povis forrabi ĉiun ajn knabinon, kiun ili trovis plaĉa. La mongolaj gejunuloj povas geedziĝi tute libere nur post la Liberiĝo.

Je tiuj vortoj, la gepatroj de la fianĉino alvenis por prezenti al ni vinon. Tiu familio konsistis el ok membroj. La mastrino diris al ni kun rideto: “La fianĉino estas nia unua filino. Ŝi nomiĝas Solongo, ŝi estas 22-jara, taĉmentestrino. Sub ŝia gvido, la paŝtistoj bone laboris kaj ricevis riĉan rikolton en brutobredado de tiu ĉi jaro, kaj nia familio enspezis pli ol 1,800 juanojn. Pliboniĝis nia vivo,

tial ni volas frue edzinigi la filinon.” Kaj sekve ŝi laŭdis ankaŭ ŝian fianĉon, kiu nomiĝas Somia kaj laboras kiel traktoristo. Lia familio prizorgis 336 ĉevalojn de la taĉmento kaj vivis en feliĉo. Ambaŭ familioj vivadis sur la stepo de multaj generacioj kaj bone konas unu la alian. La gepatroj delonge havis intencon interligi siajn infanojn kaj ankaŭ la plenkreskiĝintaj gefiloj falis en reciprokam amon, kaj post la interkonsiliĝo de ambaŭ flankoj, ili decidis okazigi geedziĝan solenon en la bela sezono sur la stepo.

Antaŭvespere de la geedziĝa soleno, laŭ loka kutimo, ne nur la familio de la fianĉino sed ankaŭ la najbaraj jurtoj jam komencis muziki, kanti, trinki vinon kaj gaje sin amuzi, kaj tio daŭris ĝis la tagiĝo.

Iom post iom fariĝis hele en la oriento, kaj la stepo kaj malproksimaj montoj bele transformiĝadis en la matena nebulo. Subite aŭdiĝis henoj de malproksime — rajdantoj en koloraj naciaj kostumoj alproksimiĝis. Ili venis por forkonduki la novedzinon. Inter ili estis alta junulo en ruĝa silka robo, kun ruĝa silka rubando ĉirkaŭ la ĉapo, ore flava larĝa zono ĉirkaŭ la talio kaj altaj botoj sur la piedoj. Lia mieno prezentis videblan emociiĝon — kredeble li estis la novedzo.

Jen knabino paŝis el la jurto de la novedzina familio, kaj ŝi ekkantis post prezento de vino al la gastoj:



La novedzo prezentas hada-on al parencoj de la novedzino por esprimi respekton.



Disŝiri ŝafkolon estas provo por la novedzo.

*Ĉi tie ĉiam heroplenas, feliĉ-
plenas,
kunvenas raraj bestoj, ĉiujn
dio benas.
Por gastoj ja ne decas sid-
atendo,
feniks' ne povas preterflugi
en silento,
eĉ reĝ' ne povas pasi sen
salutoj.
Por kio do vi venas kvazaŭ
mutaj?*

La akompananto de la nov-
edzo ekkantis responde:

*Kun amikeco de l' prapatroj,
por parenceco de favoro,
ni venas kun bofilo por la
mastro.
Akceptu nin kun varma koro.*

Poste la gastoj estis invititaj
en la jurton escepte de la nov-
edzo kaj lia akompananto. La
novedzina akompanantino kaj
alia virino etendis ruĝan tulan
rubandon kaj baris al ili la
pordon.

*Vi estas ĉarmaj kiel lotus-
floroj,
benplenaj kiel pavo en
parado,
sed kial vi etendas ruĝan
tulon*

antaŭ la pordo por blokado?

La virino kaj la akompanan-
tino de la novedzino tamen lin
ignoris en silento. Kaj la akom-
pananta junulo ekkantis denove:

*Por la fianĉin' la patro donis
oron,
por ŝi l' patrino jadhar-
pinglon belan.
Ni venas kun ĉevaloj kaj
kameloj
portantaj faman teon kaj
trezorojn:
silkaĵojn, agataĵojn, brilajn
perlojn,
por peti de vi kor-favoron.
Ni venas tien ĉi de foro.
Ĉu vi akceptos la donacojn
en tuteco,
aŭ ekzamenos ilin pec' post
peco?*

Por provi lin ankoraŭ iom, la
knabino diris: "Ni kalkulos
ilin peco post peco!" Responde
al tio, la akompananto de la
novedzo postulis, ke ŝi starigu
jadan tablon kaj elprenu santa-
lajn pletojn por ke ili surmetu la
donacojn. Ĉar la akompanan-
tino de la novedzino ne disponis
pri tiaj objektoj, ŝi do formetis
la ruĝan tulon kaj diris, ke ili

akceptos la donacojn sen kal-
kulo.

Kiam la novedzo kaj lia
akompananto eniris la jurton, la
akompanantino de la novedzino
kaj aliaj ses aŭ sep knabinoj tuj
ĉirkaŭis la novedzon. Ili atakis
lin per pluraj popolkantoj por
lin provadi, kaj la lasta tamen
sukcesis rompi la barojn per
siaj kantoj sub helpo de la
sagaca akompananto.

Dum la konkursado de kan-
toj, ambaŭ flankoj montris tre
bonan konon de la popolkantoj
pri geedziĝo, kaj neniu estis pri-
ridita aŭ punita per vintrinko
pro sia nekapablo eltrovi taŭgan
kanton por respondo. Fine
venis la momento por forkon-
duki la novedzinon.

Dank' al helpo de multaj ami-
kinoj, la novedzino jam estis
bele vestita: sur ŝia kapo brilis
bidoj kaj arĝentaj ornamaĵoj,
sur ŝia korpo bone sidis kolora
mongola robo borderita per bro-
daĵoj, ĉirkaŭ ŝia talio estis lar-
ĝa silka zono kaj sur ŝiaj piedoj
altaj botoj. La knabino aspektis
vere eleganta.

En kantado la novedzino



La novedzino estas ornamata de siaj akompanantino kaj amikinoj.

adiaŭis siajn gepatrojn kaj intimajn amikinojn. Fine la gastoj, alvenintaj por forkonduki la novedzinon kaj la akompanantinoj de la novedzino, ĉiuj surĉevaliĝis kaj galopis for kune kun la nova paro.

Alia punkto en la kutimo de la tradicia geedziĝa ceremonio de Ordos-stepo estas tio, ke survoje ambaŭ grupoj de la novedza kaj novedzina flankoj klopodas por malhelpi unu la alian kaj atingi la unua la cellokon. Kvankam la grupo de la novedzino elpensis multajn artifikojn por haltigi la grupon de la novedzo, tamen la familio de la lasta antaŭe jam faris ruzan aranĝon, nome regali la gastojn per festeno nemalproksime de la hejmo. Profitante tiun okazon, oni ŝtele ŝanĝis la ĉevalon de la novedzo per alia rapidega ĉevalo, kiu portis la lastan la unua al la hejmo.

Antaŭ la jurto por la nova paro, la novgeedzoj trapasis, kun vipo en mano, flaman fajron por montri sian bravecon kaj virtecon. Poste la gepatroj de la novedzo kondukis la novedzinon en la jurton.

Tiu jurto estis vasta, pura kaj bele ornamita. La terlito estis kovrita per lana teksaĵo kaj sur ĝi kuŝis unu sur alia ruĝa, roza kaj flava vatitaj silkaj litkovriiloj bonorde falditaj kaj du kapkusenoj kun broditaj amobirdoj (*Aix galericulata*, akvobirdo simila al anaso, rigardata de ĉinoj kiel simbolo de fidela amo). Sur la planko staris du paroj da novaj kestoj por vestaĵoj, sur kiuj metiĝis radioricevilo, vekhorloĝo k.a. Ĉe angulo staris kudromaŝino. Gratulantoj arope eniris kaj eliris kaj la jurto plenis de ĝojo.

La novedzino riverencis al la gepatroj kaj parencoj de la novedzo laŭ mongola maniero kaj akceptis iliajn donacojn. Kaj post tio, la novedzo, kun arĝenta vinkruĉo en mano, kaj la novedzino, kun vinglasoj sur pleto, prezentis vinon al la geonkloj kaj geavoj kaj la honoraj gastoj. Kaj inter la ĝojaj festantoj la benantoj komencis kanti antikvajn popolkantojn por beni la novan paron en akompano de muziko de trikorodo kaj ĉevalkapa kordmuzikilo.

La soleno daŭris du tagojn kaj fine ĉiuj gastoj estis kolektitaj por abunda festeno simbollanta feliĉan kuniĝon. Antaŭ la nova jurto oni metis 6 tablojn plene ŝarĝitajn per ses grasaj rostitaj ŝafoj, laktaĵoj, kukoj kaj nektaro. La kunvenantoj sidis ĉirkaŭ tapiŝoj etenditaj sur herbejo kaj ĝoje kantis laŭ tintado de taso kaj glasoj kaj iuj ekdancis gracie. Tre longe daŭris ilia sonora popolkanto sur la vasta stepo:

*L' akuŝa horo estas ne plej
bela
por la mirinda ĉevalin'
fabela,
sed tempo por galopo kaj
petolo
de ĝia ĉevalid' kun novaj
haroj
sur ĉiu gamb', en gajhumoro.
Ne plej plezuras naskiĝhoro
de nova ido por la homo,
sed tempo por ligiĝ' de koroj
en jurto blanka kiel nupta
domo.*

*Ja tiam regas gajhumoro.
Parence ni nin interligas,
ĉar multajn jarojn ni amikas.
Nun vere ĝojas nia koro,
ĉar patrolanda modernigo
ja estas nia komuna volo!*



Akvofalo Detian en Daxin-gubernio de Guangxi



Ĉinaj akvofaloj

de ZHANG QINGXIANG

LA topografio de Ĉinio estas komplika kaj pro abruptaj ondiĝoj de la tero formiĝis multaj rapidejoj kaj akvofaloj ĉe la riveroj, kiuj aldonis al nia lando superbajn pejzaĝojn admirindajn por turistoj.

BELAJ AKVOFALOJ SUR MONTEGOJ

En la monteta regiono de sud-orienta Ĉinio, troviĝas multaj

belaj montoj kun sennombraj torrentoj en ravinoj.

Ĉe la granda lago Poyang alte staras monto Lushan kun multaj ĉarmaj akvofaloj, el kiuj la plej fama estas Sandiequan sur la orienta deklivo. Ĝi estas triŝtupa akvofalo kun alteco de ĉ. 300 metroj. Ĝi aspektas kvazaŭ longa neĝblanka silkaĵo pendanta en la aero kaj spiras imponecon. La akvofaloj Flava

Drako, Nigra Drako kaj Stenporda Torento en profundaj valoj sur la sudokcidenta deklivo kaj tiu de Jiandaoxia sur la norda deklivo diferencas en aspekto unu de alia.

Sur la rokmuroj de la monto Huangshan en Anhui-provinco, kiu estas fama pro sia nubomaro, pendas multaj akvofaloj, inter kiuj la plej fama estas la Naŭdraka Akvofalo kun naŭ

ŝtupoj, kies torento flugas mal-supren kun tondra bruo kvazaŭ naŭ blankaj drakoj.

La pitoreska Yandang-monto en Zhejiang (Ĝegiang)-provinco estas fama de antikveco pro siaj akvofaloj. Ĝi havas entute 13 akvofalojn inkluzive de la Granda Drako, Malgranda Drako, Hirunda Vosto, Tri Ŝtupoj kaj Perla Kurteno. La Granda Drako estas la plej granda el ili. Ĝia torento falanta de rokmuro alta je 200 metroj estas vere ĉarma spektaklo.

Ne malproksime en la nordokcidento de la pitoreskejo Yangsuo de Guilin en Guangxi (Guanghi) troviĝas rezervejo nomata Huaping. En tiu loko sin trovas dekoj da akvofaloj, inter kiuj Hongtan alta je pli ol 30 metroj kaj Xiaotan kun du akvokolonoj falantaj en unu lageton estas la plej interesaj.

Krome, sur la montoj Emei en Sichuan (Siĉuan), Fanjing en Guizhou (Gujĝoŭ), Jinggangshan en Jiangxi (Gianghi), kaj sur montoj de Fujian (Fugian) kaj Taiwan (Tajvan) troviĝas interesaj akvofaloj, kiuj kune kun altaj montoj, krutaj rokmuroj, arboj kaj montaj torentoj formas rigardindajn pejzaĝojn.

POTENCAJ AKVOFALOJ SUR ALTEBENAĜOJ

En la altebenaĵoj de okcidenta Ĉinio troviĝas multaj akvofaloj. La akvofalo Huangguoshu sur la Yunnan-Guizhou (Junnan-Gujĝoŭ)-a Altebenaĵo estas unu el la plej grandaj akvofaloj de Ĉinio. Tie troviĝas rara grupo de naŭ akvofaloj starantaj en ŝtupoj unu super alia. La plej granda inter ili portas la nomon Huangguoshu. Ĝi larĝas je pli ol 20 metroj kaj

altas je 57 metroj. La potencega falakvo tondre muĝadas sin verŝante en profundan lagon, disjetante akverojn ĝis cent paŝoj malproksimen kaj prezentante ĉarman ĉielarkon en la suno.


Trafluante la kanjonon Kruĉbuŝo sur la Loesa Altebenaĵo, Huanghe (Flava Rivero) devas fari descendon laŭ la kruta riverlito alta je pli ol 30 metroj kaj tiel formas grandiozan akvofalon kun larĝeco de ĉ. 50 metroj. En tiu loko, la potencega flava torento kun surdiga muĝego formas vere imponan bildon.

La rivero Yarlung Zangbo estas la plej alte situanta rivero en la mondo. En la kanjono Jyacha ĝi torentas tiel rapide, ke la sekunda flukvanto atingis ĉ. 1,000 kubmetrojn, kaj ĝi formis tie du akvofalojn kun

respektiva alteco de 46 kaj 53 metroj. La du akvofaloj distancas unu de la alia je malpli ol 500 metroj kaj produktadas animskuan tondregon en la kanjono.

MIRINDAJ KARSTAJ AKVOFALOJ

En Ĉinio estas multaj kalkŝtonaj areoj, kie formiĝis ne nur multaj groteskaj montoj kaj kavernoj sed ankaŭ multaj interesaj akvofaloj. Ekzemple, Jinhua-monto de Zhejiang-provinco kun multaj karstaj kavernoj, fontoj kaj groteskaj rokoj estas vizitinda loko por turistoj. Tie troviĝas mirinda kaverno nomata Kruĉo, en kiu troviĝas diversaj groteskaj stalagmitoj kaj stalaktitoj kaj akvofalo kun alteco de 30 metroj. Starante ĉe la fundo de la kaverno oni povas vidi, ke la akvofalo similas al giganta kurteno brilanta en



Akvofalo Bai-zhang en la monto Huangshan de Anhuiprovinco



Akvofalo Fang-shiling en Xing-guo - gubernio, Jiangxi-provinco



Akvofalo la Granda Drako en Yandang-monto de Zhejiang-provinco

la lumo enlasita de supre, kaj ĝui senton poezian.

En Yixing-gubernio de Jiangsu-provinco troviĝas vizitinda kaverno nomata Shanjuan, kiu similas al ŝtona etaĝdomo kun kvar ĉeloj supra, meza, suba kaj malantaŭa interligitaj unu kun alia. En la kaverno estas groteskaj stalagmitoj kaj stalaktitoj, kaj la malsupra kaverno ligiĝas kun subtera rivero navigebla per boato. Antaŭ la aperturo de la malsupra kaverno plaŭdas falakvo kun disŝprucantaj akvejoj, kun bruo simila al tiu de fulmotondro kaj ventego.

AKVOFALOJ DE KRATERAJ LAGOJ KAJ TERMOFONTOJ

En Ĉinio sin trovas 900 ne tre maljunaj vulkanoj kun

krateraj lagoj kaj lagoj formitaj pro obstrukco, ĉe kiuj kreiĝis belaj falakvoj. En la rezervejo en Changbai-montaro en Jilin (Gilin)-provinco troviĝas superba akvofalo, kies akvo devenas de grandega kratera lago kaj post fluado tra kanjono je pli ol unu kilometro longa subite verŝiĝas malsupren en valon je 68 metroj altan. Vintre la falakvo turniĝas en gigantan glacian kurtenon brilantan en sunlumo.

Jingpo-lago en Heilongjiang (Hejlonggiang)-provinco estas la plej granda kratera lago en Ĉinio. Ĉe ĝia norda fino formiĝis impona akvofalo kun larĝeco de ĉ. 40 metroj. Ĝiaj du akvobranĉoj falas de 12-metra alteco en kavegon profundan je dekoj da metroj plaŭdante kun tondra bruego, produktante

nebulan vualon kaj ĉielarkon en sunbrilo.

Ĉinio estas unu el la landoj kun multaj termofontoj. Pli ol 2,600 tiaj fontoj estas trovitaj. La varmaj fluoj el iuj termofontoj formis apartan specon de akvofalo vaporanta. Ekzemple oni povas vidi tian fonton ĉe Conghua norde de Guangzhou (Kantono), Tengchong de Yunnan-provinco kaj Beitou de Taiwan.



LA NOVAJ KONSTRUOJ DE LA BEIJING-A INTERNACIA AERODROMO



Panoramo de la Beijing-a Internacia Aerodromo

“Mi vivis en Usono jam pli ol 40 jarojn kaj unuafoje revenis al la patrolando. Ĝiaj ŝanĝiĝoj, kiujn mi vidis, vere estas tre grandaj,” tion mi aŭdis de maljunulo, kiu tuj flugos al Japanio por tie ŝanĝi aviadilon al Seattle, en aŭtobuso de la Ĉina Civila Aviada Administracio rapide veturanta al la aerodromo.

De la centro de Beijing (Pekino) nia aŭtobuso veturis nordorienten tra ombroplena ŝoseo de pli ol 20 km., kaj poste surkuris la ŝoseon specialan por la aerodromo. Post plia iom-pli-ol-duon-hora veturado ni atingis la nove konstruitan parton de la Beijing-a Internacia Aerodromo.

Ĝi estas ĉefa flughavena instalaĵo de la ĉina civila aviado, konforme al la plimultiĝo de niaj internaciaj aeraj linioj kaj


turistoj el diversaj landoj. Tiu nova parto havas la areon de proksimume 200,000 kvadrataj metroj, inkluzive pli ol 20 konstruajn objektojn, kiaj manovraj areoj, haltaj areoj, centra domo, hotelo, aviadila riparejo, direkta turo kaj radara manovrejo. Ĝi povas akcepti la plej grandajn aviadilojn de la mondo.

Iun tagon de la unua tagdeko de la lasta novembro, mi vizitis la Beijing-an Internacian Aerodromon. Trapasinte la kruciĝejan ponton, mi venis al la elira salono en la dua etaĝo de la centra domo. Tiu domo estas oblonga konstruaĵo kun ĉina stilo. Kiam pasaĝeroj venas al la ripoza koridoro de la tria etaĝo per lifto, ili povas tie ripozi, trinkante teon aŭ kafon kun siaj parencoj

aŭ amikoj. Ambaŭflanke de la koridoro estas du restoracioj, kiuj povas samtempe akcepti pli ol 1,500 klientojn. La plafono de la salonoj surhavas ornamajn desegnojn, la planko estas masonita per verdaj artefaritaj marmoro-pecetoj kaj la muroj surhavas grandajn freskojn pentritajn de ĉinaj artistoj.

Norde de la ripoza koridoro estas balkono, de kie oni povas vidi la nove konstruitan kurejon, longan je 3,200 metroj kaj larĝan je 500 metroj, kiu ebligas surteriĝon aŭ forflugon de granda aviadilo kun pezo de 350 tunoj.

Sur la balkono oni povas vidi du rondajn konstruaĵojn etenditajn de la centra domo, kiujn oni nomas satelitaj domoj. Laborantoj de la aerodromo diris al mi,



*Movebla koridoro
por ascendo kaj
descendo*

ke la satelitaj flughavenaj domoj kiel nova sistemo de flughavena konstruado aperis en la sesdekaj jaroj. Pro rapida multiĝo de pasaĝeroj kaj senĉesa progreso de aviadiloj, ankaŭ flughavenoj fariĝis ĉiam pli grandaj. Tiel iuj aerodromoj faris plian konstruadon surbaze de la pasintaj flughavenaj domoj kaj la konstruaĵoj ĉiam etendiĝis pli foren.

Tio kaŭzis al la pasaĝeroj longan piediradon en ascendo aŭ descendo de aviadiloj. Por mallongigi la piediradon de la pasaĝeroj oni konstruis tian satelitan domon.

Inter la centra domo kaj la satelitaj domoj estas koridoroj surteraj aŭ subteraj. En tiuj koridoroj ekipiĝis aŭtomataj vojoj por faciligi la transiradon de

pasaĝeroj. Aviadiloj povas halti ĉirkaŭ la satelitaj domoj. En la koridoroj inter la centra domo kaj la du satelitaj domoj ekipiĝis du aŭtomataj vojoj 100-metroj. Antaŭ ol veni al la ripoza salono, la forirontaj pasaĝeroj devas plenumi en la elira salono komisiadon de transportotaj pakajoj, akcepti ekzamenadon de bileto, kvaranteniga atestilo kaj pasporto. Kiam la megafonoj anoncis ascendon, la forirontaj pasaĝeroj povas veni al la ascenda salono de la satelita domo per aŭtomata vojo kaj post ekzamenado de bileto ili povas eniri la aviadilon tra movebla ascenda ponto.

La rondaj satelitaj domoj estas trapasejoj por la alvenantaj kaj forirantaj pasaĝeroj. En la salonoj ili povas vidi surteriĝon kaj ekflugon de aviadiloj.

La alvenantaj pasaĝeroj, post descendo de la aviadilo, povas veni al la enira salono en la teretaĝo per aŭtomata vojo kaj lifto. La pasaĝeroj devas plenumi tie formularojn de kvaranteniga atestilo, pasporto, dogano kaj pakajo-reprenado. Fininte ĉion supre diritan, ili povas mem

Restoracio



preni siajn pakajojn de sur rota-
cia breto en la pakaja salono kaj
poste ili povas eniri la pasaĝeran
salonon.


La pasaĝera salono, kie inter-
vidiĝas pasaĝeroj kaj bonveni-
gantoj, estas en varma koloro.
La planko el oranĝa artefarita
marmoro kaj 16 jujubruĝaj mar-
moraj kolonoj en la salono sen-
tigas varmon kaj agrablecon.

Ekster la pasaĝera salono
estas parko, kie la pasaĝeraj
aŭtobusoj de la Ĉina Civila
Aviada Administracio kaj tak-
sioj atendas pasaĝerojn.

Ambaŭflanke de la enira kaj
elira salonoj de la centra domo
sin trovas ripozĉambroj por
aviadilaj personoj, aerotrans-
porta centralo kaj aliaj. Krome,
tie estas ankaŭ servoj de P.T.T.,
banko, taksioj, pakajo-deponado
kaj aliaj.


Hodiaŭ, la ĉina civila aviado
estas en rapida disvolvado, ĝiaj
pli ol 100 enlandaj aeraj linioj
kun totala longo de 149,000 km.
ligas pli ol 80 urbojn. Ĉinaj
civilaj aviadiloj flugantaj sur 12
internaciaj aeraj linioj povas
atingi oriente Tokion kaj okci-

*Interne de la
movebla kori-
doro*



dente la okcidentan Azion kaj la Beijing-a Internacia Aerodro-
multajn eŭropajn landojn. la mo servos pli bone al la ĉinaj
nova konstruita centra domo de kaj alilandaj pasaĝeroj.

Aŭtomata vojo



LA KOMEDIO

"Du Ĝemeloj kaj Du Ĝemelinoj"

de LAO BAI



BONVOLU rigardi la foton: Kiel la du junuloj kaj la du junulinoj similas unu la alian respektive! Ili estas ĉefroluloj de la komedia filmo "Du Ĝemeloj kaj Du Ĝemelinoj".

Estas hazarde, ke la du ĝemeloj Dalin (maldekstre) kaj Xiaolin (dekstre) konatiĝis kun kaj enamiĝis al ĝemelinoj Fangfang (maldekstre) kaj Yuanyuan (dekstre) respektive. Ĉar ili similas unu la alian kaj portas samajn vestojn, oni ofte prenas ilin unu por la alia kaj okazis multaj ridindaĵoj.

La pli juna frato Xiaolin estas komizo de iu magazeno por manĝaĵoj. Lia kuzino koniĝis al li amikinon. Li ĉiamaniere klopodis por komplezi al sia amikino kaj el tio disvolviĝis serio da komediaj intrigoj.

Iun tagon, Yuanyuan en akompano de la konigantino

venis al la magazeno por intervidiĝi kun Xiaolin. Li afable akceptas ŝin, dum li krude kaj flegme traktas alian klienton, kiu venas pli frue ol Yuanyuan, kaj misvendas al li fermentigilon anstataŭ pulvoran spicaĵon. Foje Xiaolin invitis Yuanyuan al parko. Por paradi sian talenton, li multe parolas al ŝi pri prezenta arto de la moderna dramo. Ĝuste tiam lia pli aĝa frato Dalin kaj liaj gepatroj venas al la parko. Kiam Xiaolin forestas por aĉeti sodakvon por Yuanyuan, Dalin venas kun boteloj da sodakvo en la manoj. Li estas modesta kaj diskreta junulo. Li laboras en iu scienca instituto kaj nun ĉie klopodas por aĉeti fortan gluilon urĝe bezonatan. Vidinte Yuanyuan, li ekmemoras foton de Fangfang sur la honora nomlisto de iu fabriko, kiu esploras la nomitan kemiaĵon. Ĉar la fratinoj tre

similas unu la alian, Dalin prenas Yuanyuan por Fangfang. Dalin estas hontema antaŭ la fremda knabino, sed sincere petas ŝian helpon, tamen la lasta miskomprenas tion, ke Xiaolin ludas teatraĵon, kaj ŝi respondas al li afekte per improvizaj teatraĵoj vortoj. Kaj la ridindaĵo finiĝas nur kiam revenas Xiaolin.

Promenante en la parko, la patrino de Xiaolin vidis kaj tre ĝojas, ke la filo jam havas amatinon. Ĵus hejmen reveninte, ŝi tuj akompanas Xiaolin al magazeno por aĉeti pecon da ŝtofo por Yuanyuan. Por elekti idealan pecon, li petas maljunan komizon montri dekojn da specoj de ŝtofo, afekte alparolante lin kaj eĉ malĝentile frapante lian ŝultron. Li tute ne atendas, ke tiu maljuna vendisto estas la patro de Yuanyuan.

En la okuloj de Yuanyuan Xiaolin estis kapabla en ĉio. Foje ŝi petis lin aĉeti por ŝi plej modan virinan mansaketon. Xiaolin ĉiel klopodis pri tio, sed ne sukcesis. Yuanyuan tre koleras, kaj ilia rilato preskaŭ frostiĝis.

Dalin kaj Fangfang estas paro de alia tipo. Ili laboras sinforĝese kaj diligente. Ilia amikeco kaj amo baziĝas sur la sama idealo. Foje Dalin enhospitaliĝis pro vundiĝo kaj informiĝis hazarde pri forta gluilo. Li kun malpacienco volas elhospitaliĝi por aĉeti ĝin. Sed la kuracisto ne konsentas. Tiutempe lia frato Xiaolin venas viziti lin. Antaŭ ol li trovas tempon por detale klarigi al Xiaolin la aferon, li jam demetas sian malsanulan veston kaj metas ĝin sur la fraton kaj elglitas el la hospitalo. Ne trovante alian rimedon, Xiaolin devas kuŝiĝi, anstataŭ sia frato, sur la lito en malsanula vesto. Estas neatendite, ke flegistino venas fari injekton al li kaj ordonas lin preni medikamenton. Tio metas lin en grandan embarason. Tiutempe Dalin revenas al la hospitalo plenuminte la aĉeton, kaj klariĝas la afero. Ĉiuj laŭdoj al Dalin pro lia ago forte skuas Xiaolin. Li sentas honton kaj decidas forigi siajn mankojn, diligente labori kaj modeste lerni de maljunaj vendistoj. Ne longe post tio Xiaolin fariĝis eminenta komizo. Lia progreso inspiras ne nur Yuanyuan sed ankaŭ lian patrinon, kiu deziras antaŭenmarŝi kune kun la epoko.

La filmo prezentas fragmentojn de vivo de junuloj en mo-

dernigo de la patrolando kaj havas epokan etoson kaj vivspiron. Ĝi ne nur ebligas al la spektantoj ĝuon de beleco, sed ankaŭ inspiras ilin al progreso. Liberriginte sin de la rutinoj, la kompilanto kaj reĝisoro donis al la serioza enhavo humoran kaj gajan formon. La freŝa kaj aparta arta polurado kaj serena ritmo en la filmo montris lirikan kaj interesan vivon.

La fratinoj en la filmo estas luditaj de unu aktorino kaj la fratoj de unu aktoro. Gao Ying, la rolulino de Fangfang kaj Yuanyuan, estas unuafoje sur-ekranigita, kaj ankaŭ Mao Yongming, la rolulo de Dalin kaj Xiaolin, estas juna aktoro. Helpate de la reĝisoro kaj veterana aktoroj, ili sukcese modlis la figurojn tute malsamajn en ka-



Aktoro Mao Yongming, la rolulo de Dalin kaj Xiaolin

raktero, sintenado kaj paroloj kaj per tio gajnis laŭdojn de la spektantoj



Aktorino Gao Ying, la rolulino de Fangfang kaj Yuanyuan

KONSEKRADO DE NOVA EPISKOPO EN BEIJING

JE la 21-a de decembro, 1979, la festotago de Sankta Apostolo Tomaso, okazis konsekra soleno en la Beijing-a diocezo, dum kiu la speciale invitita Mikelo Yang Gaojian, episkopo de la Changde-a diocezo de Hunan, konsekris sub asisto de Zhang Jiashu, episkopo de la Shanghai-a diocezo, kaj Wang Xueming, ĉefepiskopo de la Huhhot-a diocezo en la Interna Mongolio, novan episkopon de la Beijing-a diocezo Mikelon Fu Tieshan. Ĝi estis malofte vidita tradicia religia rito de la Beijing-aj religiuloj dum la pasintaj 20

jaroj kaj ankaŭ estis la unua grava afero de la restariĝo de la Katolika Patriota Asocio de Beijing post la frakaso de la kvarpersona bando kaj la efektivigo de la politiko de la popola registaro pri la libero de kredado je religio.

Sacerdoto Mikelo Fu Tieshan estis unuvoĉe elektita de la katolika klerikaro kaj la reprezentantoj de la lokaj katolikoj kiel episkopo de la Beijing-a diocezo je la 25-a de julio, 1979, la festotago de Sankta Apostolo Jakobo la pliaĝa, laŭ la principo

de sendependeco kaj memstareco kaj memmastrumado de ekleziaj aferoj kaj la tradicio de elektado.

Episkopo Mikelo Fu Tieshan estas 48-jaraĝa kaj devenis el pia katolika familio. Ekde sia infaneco li kredas pie je katolikismo. En la aĝo de 10 jaroj li komencis lerni en malgranda seminario de la Beijing-a diocezo kaj poste trapasis sep-jaran kurson en la Beijing-a monaĥejo. En 1950 li estis sendita al seminario por daŭre lerni. En 1953 li estis tonsurita kaj en 1956 li fariĝis pastro. Post kiam li diplomitiĝis el la seminario, li instruis unu jaron en monaĥejo. Kaj poste li predikis en la Suda Katedralo. Li estas respektata de la ekleziaj funkciuloj kaj lokaj katolikoj pro siaj moralaj kaj scioj.

Li estas la dua episkopo post kiam la Beijing-a diocezo ekpraktikis la principon de sendependeco kaj memstareco kaj memmastrumado de ekleziaj aferoj (La unua episkopo Yao Guangyu forpasis en 1960). Li estas ankaŭ la tria ĉina episkopo en Beijing dum la 379 jaroj post la enkonduko de katolikismo en 1601. Antaŭ la Liberiĝo pli ol 90 procentoj de la katolikaj

Konsekranto-episkopo Yang Gaojian (meze), asistantoj-episkopoj Zhang Jiashu (la unua de dekstre) kaj Wang Xueming (la tria de dekstre) faris por nova episkopo Mikelo Fu Tieshan la ceremonion de vertmankovro.



episkopoj estis misiistoj el fremdaj landoj.

Post la Liberiĝo laŭ la konstitucio la popola registaro praktikas la politikon de libero de kredado je religio. En 1957 la ĉina katolikismo fondis sian Tutlandan Katolikan Patriotan Asocion kaj starigis por si la principon de aŭtonomeco, memevangeliado kaj memfinancado. Ekde 1958, entute pli ol 50 novaj episkopoj estis elektitaj de la eklezianoj. La ĉinaj katolikoj opinias, ke la eklezia aŭtoritato venas de Dio kaj la voĉo de la popolo estas tiu de Dio. Laŭ ilia konsidero estas tre grave protekti siajn rajtojn memstare hereditajn de la apostoloj de Kristo.

La konsekrado iris laŭ tradiciaj ceremonioj de la Eklezio. Starante antaŭ la altaro kun siaj manoj metitaj sur la Biblio, episkopo Mikelo Fu Tieshan en ruĝa ornato ĵuris solene: "Mi obeos la ordonojn de Dio kaj persistos en la principo de sendependeco kaj memstareco kaj memmastrumado de ekleziaj aferoj kaj dediĉos mian tutan vivon al la Eklezio." Li esprimis sian deziron unuiĝi kun la eklezia funkciularo kaj eklezianaro por fari kontribuon al la kvar modernigoj de la patrolando.



Nova episkopo Mikelo Fu Tieshan benas katolikojn.

Fremdlanda katoliko en Beijing kisas la ĵingoringon de la nova episkopo.



La episkopoj, kiuj direktis la riton, faris por Mikelo Fu Tieshan la ceremonion de almeto de manoj sur la verto kaj sanktoleado por enoficigi lin al episkopeco de la Beijing-a diocezo.

La solenon ĉeestis laŭinvite ĉ. 700 personoj, inter kiuj estis la episkopoj el la diocezoj de Tianjin (Tiangan), Xuanhua (Hjuanhua), Jinzhou (Gingou),

Hankou kaj Wuchang (Vuĉang) kaj la gvidantoj de la Beijing-aj religiaj rondoj, inkluzive de la reprezentantoj de kristanismo, islamo, budhismo kaj lamaismo, kaj katolikoj ĉinaj kaj eksterlandaj. Patriotaj eklezioj, pastroj kaj katolikoj en multaj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando alsendis pro tio donacajojn aŭ gratulajn telegramojn.

**LA TOTALA INDUSTRIA
PRODUKTOVALORO DE
ĈINIO PLIIGITA JE PLI
OL 8% EN 1979**

La produktovaloro de Zhejiang (Ĝegiang), Hubei (Hubej), Jiangsu (Giangsu), Hunan, Sichuan (Siĉuan), Jiangxi (Gianghi), Beijing (Pekino), Shanghai (Ŝanhajo) kaj aliaj 6 provincoj pliiĝis je pli ol 8% kaj pleje je 17%. La produktovaloro de 79 el la pli ol 100 ĉefaj industriaj produktaĵoj de la tuta lando superis la ciferon difinitan en la ŝtata plano. La produktovaloro de la malpezaj industrioj de la tuta lando kreskis je 9%, dum tiu de la peza industrio je 7.4% — tio montras ŝanĝon en la produktado de la ĉina industrio. Plimultiĝis la ĉinaj industriaj produktaĵoj eksportitaj al la internacia merkato, kaj la eksporta plano de la ŝtato pri tekstilaĵoj, produktaĵoj de aliaj branĉoj de malpezaj industrioj, metalaj mineraloj, kemiaj fabrikoj, maŝinoj kaj metiartaĵoj estis plenumita antaŭdate. Rimarkinde malaltiĝis la konsumo kvanto de energio en la kvar ĉefaj industriaj branĉoj elektro, kemio, metalurgio kaj fervoja trafikado. La ŝparita kvanto de energio egalas al 11,000,000 tunoj da karbo. La Ŝtata Ekonomia Komisiono alvokis al la industriaj departementoj de ĉiuj lokoj klopodi plue kaj disvolvi

movadon de pliprodukto kaj ekonomia mastrumado, por akiri novajn fruktojn en industria produktado.

**PLI OL 160 MINERALAJ
REZERVEJOJ TROVITAJ
EN ĈINIO**

En 1979, pli ol 160 mineralaj rezervejoj estis trovitaj aŭ plivastigitaj en Ĉinio. Interalie estis pli ol 30 rezervejoj de fera metalo, pli ol 50 rezervejoj de neferaj kaj noblaj metalaj mineraloj, pli ol 30 rezervejoj de nemetalaj mineraloj kaj rezervejoj de uranio, diamanto, gipso, grafito, jado kaj raraj metaloj. 16 ĉefaj mineraloj estas metitaj en la ŝtatan planon. Antaŭ nelonge, geologiaj laborantoj de Xinjiang (Hingiang) prospektoris 4 grandajn karbokampojn laŭlonge de la fervojo de la suda Xinjiang. La totala kvanto de ilia karbo estas pli ol 4,460 milionoj da tunoj.

**FINKONSTRUO DE LA
PLEJ GRANDA VINILONA
FABRIKO DE ĈINIO**

Finkonstruiĝis la Sichuan-a Vinilona Fabriko, kiu estas la plej granda en sia speco en Ĉinio, kaj jam elproduktis normajn vinilonajn fibrojn. Tiu fabriko troviĝas en Changshou-gubernio proksime de Chongqing (Ĉongking), kaj estas armita ĉefe per ekipaĵoj importitaj el Japanio kaj Francio. Ĝi prenas naturan gason kiel materialon kaj povas produkti ĉiujare 45,000 tunojn da vinilonaj fibroj.

**PLI OL 2,000 ĈINAJ
ŜOFOROJ SEKURE
VETURIS PLI OL MILIO-
NON DA KILOMETROJ**


En nia lando, 2,527 ŝoforoj jam sekure veturis pli ol milionon da kilometroj. Interalie, Gao Xuelin de la Trafika Buroo de Heilongjiang (Hejlonggiang)-provinco, honore titolita kiel "Superklasa Ŝoforo", jam sekure veturis 1.8 milionojn da kilometroj. Por veturi milionon da kilometroj ĝenerale 20 jaroj estas bezonataj. La eminentaj ŝoforoj, kiuj sekure veturis pli ol milionon da kilometroj, estas plejparte veteranaj laboristoj kun aĝo de ĉ. 50 jaroj, kaj ili elektiĝis kiel avangardaj ŝoforoj aŭ labormodeloj.

**PLIPRODUKTO DE DEK
MILIONOJ DA TUNOJ
DA GRENO EN
ĈINIO EN 1979**

Laŭ statistiko, Ĉinio rikoltis entute 315 milionojn da tunoj da greno en 1979, t. e. je pli ol dek milionoj da tunoj pli multe ol en 1978. Ĝia pliprodukta kvanto de someraj grenoj atingis pli ol 7 milionojn da tunoj. Kvankam printempe plagis frosto kaj aŭtune tro abunda pluvo kaŭzis inundon, tamen la vasta kampanaro sukcesis akiri riĉajn rikoltojn dank' al sia klopodado.

**PLI OL 7 MILIONOJ
DA ĈINOJ RICEVIS
LABORON EN 1979**


En la pasinteco, nur ŝtataj entreprenoj kaj institucioj povis varbi junajn laborantojn. En 1979, fondiĝis diversaj kolektivaj entreprenoj, kiuj donis laboron al 48% de la 7 milionoj da junuloj. La kolektivaj entreprenoj povas esti dividitaj en jenajn specojn: 1. kvartalaj fabrikoj, vendejoj kaj servoj; 2. kolektivaj entreprenoj dependaj de ŝtataj fabrikoj kaj minejoj; 3. entreprenoj fonditaj de kolektivoj per propra kapitalo. Dank' al tio la junuloj ne nur ricevis sian vivrimedon sed ankaŭ kreis riĉaĵojn por la socio.



*Parto de la
Sichuan-a Vinilona
Fabriko*

Knabino kaj pavo

Skulptita de CHEN LONGSHENG





Geedziĝa soleno de Xinjiang-aj ujguroj

Fotoj de JIN BOHONG

La Xinjiang (Hingiang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono en nordokcidenta Ĉinio estas la plej vasta administra unuo de nia lando kaj tie loĝas pluraj nacimalplimulto, nome kazaĥoj, mongoloj, hujoj, ĥalĥazoj, taĝikoj, sibooj, uzbekoj, rusoj, tataroj, dahu-

roj, manĉuroj kaj ĉefe ujguroj. Dum longa kunvivado en tiu regiono, tiuj naciecoj formis iom post iom siajn proprajn kutimojn kaj kulturon. Ĉi tie mi prezentu al vi paron de ujguraj gejunuloj, kiuj enamiĝinte antaŭ unu jaro, geedziĝis je la fino de septembro de 1979 en sia hejmloko Kashi, laŭ la nacia tradicia ceremonio.

La ujgura geedziĝa ceremonio estas sufiĉe solena. Laŭ ilia tradicio, en la antaŭtago de la geedziĝa soleno, la novedzo kaj liaj parencoj kaj amikoj portas rizon, kuiroleon, ŝafajon kaj aliajn donacojn al la hejmo de la novedzino, kaj en la tago de geedziĝo, ĉiuj invititaj parencoj kaj amikoj vizitas la hejmon de la novedzo por gratulo kaj la mastroj ilin regalias per festeno. Kaj la gastoj prenas manĝaĵojn dum la solena festeno per sia mano, laŭ la tradicia maniero. Veturigante la novedzinon de ŝia gepatra domo al tiu de la edzo, la akompanantaj gejunuloj vigle dancadas naciajn dancojn survoje, dum muzikistoj ilin akompanas per naciaj muzikiloj.



La novedzino eliras el sia domo.


Goja amaso dum la ceremonio



La novedzino



Festeno



Gaja dancado

SHAO LINGFANG—ĈINA SPECIALISTO

PRI EZOFAGA KANCERO

SUB operacia lampo la toraka kavado de la malsanulo estis malfermita per skalpelo. Montriĝis en ĝi la ezofago kaj aorto kiel du paralelaj tuboj. Pro kancero la supra parto 7 centimetrojn longa de la ezofago estis jam truita kaj strikte algluiĝis al la aorto. La skalpelo jen kaj jen brilis inter la ezofago kaj la aorto kaj oni per ĝi zorge apartigis la patologian ŝanĝiĝintaĵon de sur la aorto kaj detranĉis ĝin. Poste oni devis kunkudri la ezofagon kun la stomako. Ordinare tio bezonis unu horon, tamen la ĥirurgo uzis anastomozilon kaj baldaŭ finis la operacion. Tia malfacila operacio bezonis sume nur du horojn kaj 35 minutojn kaj malpli ol 100 mililitrojn da sango la paciento perdis.

La malsanulo nomiĝis Zhao Shuxun. Lia kancero estis en malfrua stadio. La operaciinto estis Shao Lingfang, ĥirurgo de la Tumora Hospitalo de Henan-provinco.

Tiu ĉi estis nur unu el la operacioj de ezofaga kancero faritaj de li. Li laboris en Linxian-gubernio 13 jarojn, dum kiuj li faris pli ol 2,000 tiajn operaciojn (inkluzive de malmultaj sub lia direktado). 44 procentoj de la operaciitoj vivis ne malpli ol kvin jarojn, el 200 operaciitaj malsanuloj de frua stadio estis postvivantaj 90.3 procentoj, kies 80 procentoj hodiaŭ ankoraŭ bone vivas kaj partoprenas en fizika laboro. Iuj membroj de la Kon-

traŭkancera Esplora Centro de la Unuiĝintaj Nacioj, la Reĝa Societo de Britio kaj kanceresplora grupo de Usono, kaj elstaraj personoj de medicinaj rondoj de Francio, Germanio kaj Italio rigardis liajn operaciojn en Linxian-gubernio aŭ aŭskultis lian prelegon, li estis laŭdita de ĉiuj.

La ezofaga kancero estas unu el la oftaj malignaj tumoroj en Ĉinio. Ekde 1958, en Henan, Shanxi (Ŝanĥi), Shandong (Ŝandong) kaj Hebei (Hebej) ĝenerala kontrolado pri ezofaga kancero estis farita. Oni konstatis, ke en la nomitaj lokoj la procentoj konsistigitaj de la malsanuloj de ezofaga kancero kaj tiuj de la mortintoj pro ĝi estis kompare multaj. En Linxian-gubernio de Henan-provinco la proporcio de tiaj malsanuloj altis je 0.13 procento. La ŝtato starigis tie specialajn instituciojn por preventi kaj kontroli kanceron kaj sendis specialistojn al la lokoj, kie multaj homoj suferis de ezofaga kancero, por ke ili kune kun la amasoj eltrovu vojon por preventi kaj kontroli kanceron. En 1965 Shao Lingfang estis sendita al la Linxian-a Hospitalo de Henan-provinco.

Li aĝas 59 jarojn. En sia juneco li diligente lernis. Komence li studis pulmajn malsanojn kaj servis kiel ĉefkuracisto en la Unia Hospitalo kaj Fuwai-hospitalo en Beijing (Pekino). En la fino de la kvindekaj jaroj li akiris distingindajn sukcesojn

en operaciado kaj kuracado de pulmaj malsanoj. Post kiam li venis al Linxian-gubernio, li komencis okupiĝi pri ezofaga kancero.

Por redukti hemoragion kaj eviti infekton pro operacio, li decidis plibonigi metodon de operacio kaj traktadojn antaŭ kaj post ĝi. Laŭ la patologiaj ŝanĝoj de ezofaga kancero li pluaparte studis la fundamentajn teoriojn de biologio kaj anatomio por trovi el la densaj angioj lokon, kie oni povas fari operacion kun plej malmulta sangoperdo kaj plej bona efiko. Por mallongigi la tempon de operacio li ekzercis siajn manojn por ke ili ambaŭ povu kaj tranĉi kaj kunkudri. En 1972 li inventis anastomozilon por ezofaga kancero, kaj tiel estis meĥanizita la plej malfacila kunkudro de la ezofago kaj la stomako. Ĉar antaŭe la kunkudrado estis farita per mano, estis malfacile kunkudri firme kaj strikte, kaj malsanuloj operaciitaj ofte suferis de inflamo kaj komplikajo pro manĝajo elfluinta en la torakan kavon kaj sekve mortis. Tio estas ŝlosilo de sukceso en la operacio. Dank' al apliko de anastomozilo, manĝajo ne plu ellasiĝas kaj komplikajoj malmultiĝis rimarkinde.

Dum la projektado kaj provado de anastomozilo li legis grandan kvanton da materialo kaj pene laboris. Li veturis al Beijing kun la blua desegnaĵo kaj modelo de anastomozilo kaj ricevis subtenon kaj helpon de koncernaj veteranaj specialistoj. Laboristoj de la fabriko de operaciaj instrumentoj promesis helpi lin en provfarado. Dum la provfarado li multfoje veturis al Beijing kaj konsiliĝis kun laborantoj de la entreprenanta

fabriko. Reveninte de Beijing, li faris eksperimentojn sur bestoj. Dank' al tiu ĉi sukceso kaj pluapaŝa plibonigo de la operacia metodo pli kaj pli multiĝis la vivipovaj pocentoj de la opera-

ciitaj pacientoj. Antaŭe por unu operacio la hemoragia kvanto ĝenerale estis ĉ. 800 mililitroj, sed nun nur ĉ. 100; antaŭe unu operacio bezonis 5-6 horojn, sed nun nur du horojn kaj iom pli;

antaŭe necesis transfuzi al la malsanulo 1,200 mililitrojn da sango, sed nun nur 300 kaj iafoje eĉ neniom; kaj antaŭe la pago por kuracado de unu kazo estis 300 juan-oj, sed nun ĉ. 100.

GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)

Sola eksportanto de ĉinaj libroj kaj periodaĵoj

Kun la celo akceli la amikecon kaj kompreniĝon inter diverslandaj popoloj

Ni eksportas al ĉiuj partoj de la mondo:

- * Libroj, periodaĵoj, ĵurnaloj en la ĉina kaj fremdaj lingvoj
- * Ĉinstilaj pentraĵoj, ligno-gravuraĵoj, kaligrafiaĵoj
- * Ĉinaj ksilografajoj, popolaj papertondaĵoj
- * Belartaj eldonaĵoj
- * Sondiskoj, sonbendoj ktp.

MENDU BONVOLE ĈE: GUOZI SHUDIAN P.O. Kesto 399, Beijing, Ĉinio
Telekablo: GUOZI Beijing

ABONTARIFO DE E.P.Ĉ.

(Validas ekde la 1-a de Majo 1980)

| Lando | Valuto | 1 jaro | 2 jaroj | 3 jaroj | Lando | Valuto | 1 jaro | 2 jaroj | 3 jaroj |
|-------------|--------|--------|---------|---------|--------------------------------------|--------|--------|---------|---------|
| Aŭstralio | \$A | 5.70 | 9.60 | 14.40 | Svisio | SF | 10.50 | 17.60 | 26.40 |
| Aŭstrio | Sch | 81.60 | 136.00 | 204.00 | Usono | US\$ | 6.00 | 10.00 | 15.00 |
| Belgio | BF | 180.00 | 300.00 | 450.00 | Kanado | Can\$ | 7.20 | 12.00 | 18.00 |
| Britio | £ | 3.00 | 5.00 | 7.50 | Por aliaj landoj en Eŭropo: | | | | |
| Finnlando | FMK | 24.00 | 40.00 | 60.00 | | £ | 3.00 | 5.00 | 7.50 |
| Francio | FF | 26.40 | 44.00 | 66.00 | | US\$ | 6.00 | 10.00 | 15.00 |
| FR Germanio | DM | 10.80 | 18.00 | 27.00 | Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj | | | | |
| Italio | Lit | 5280 | 8800 | 13200 | Latin-Ameriko: | | | | |
| Japanio | Yen | 1400 | 2800 | 4000 | | £ | 2.20 | 3.60 | 5.40 |
| Nov-Zelando | NZ\$ | 6.70 | 11.20 | 16.80 | | US\$ | 4.30 | 7.20 | 10.80 |

Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN

P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

Elekto de la perlo

(Daŭrigo)

IV

Elektraj nuboj fulmas kaj tondras en certaj kondiĉoj. La kuzino ne atendis, ke ŝiaj vortoj skuis Xinhua kiel tondro.

Guoming kaj Xinhua laboris en la sama produkta taĉmento dum pluraj jaroj. Ŝi alte taksis, prizorgis kaj ŝatis lin, tamen ŝi neniam pensis edziniĝi al li. Tio ne signifas, ke ŝi malestimas kampulojn, sed male, en la kamparo estas multaj tiel bonaj junuloj, kia Guoming. Sed kiu fariĝos ŝia edzo? Tion eble decidis ia aparta kazo. Liu Xinhua kreskis en la kamparo, kaj ŝi opiniis, ke ŝi nature devas resti la tutan vivon tie. Post kiam ŝi fariĝis komunistino kaj vilaĝa direktantino pri virinaj aferoj, ŝi pli firmiĝis en la konvinko, ke ŝia edzo certe estos kampulo. Sed strange estas, ke en la lastaj jaroj neniu el ŝiaj svatitoj estis kampulo, kaj neniu el la junuloj de la vilaĝo kuraĝis montri al ŝi sian galantecon, kvazaŭ rigardante ŝin malfacile atingebla. Precipe post kiam ŝi rifuzis la ampeton de la komunuma kadro (ĉar ŝi bone scias lin), la junuloj en la vilaĝo eĉ ne kuraĝis ŝerci kun ŝi. Jen estis la embaraso de Xinhua kaj ankaŭ la kaŭzo, kial ŝi diris al siaj onklino kaj kuzino "Vi miskomprenis min." Ŝi jam ne estis tre juna, ĉu ŝi povis ne konsideri pri sia edziniĝo? Ŝi klare vidis bonajn junulojn ĉie en la vilaĝo, kiuj plaĉas kiel brilantaj perloj. Sed

ili nur brilas senmove. Kiun perlon Xinhua devas elekti eĉ se ŝi havas kuraĝon preni? Ja necesas iaj apartaj kondiĉoj por sukceso en la elekto. La vortoj de la kuzino nun ludas la rolon de akcelilo. Antaŭe Guoming estis nur unu el la multaj perloj. Ĝi hazarde ekaperis antaŭ Xinhua kaj ne havis apartaĵon. Se Guoming ne estus rifuzita de la knabino, do ne ekzistus la ebleco por Xinhua elekti tiun perlon. Sed fakte, ŝanĝiĝis la afero kaj oni rimarkigis Xinhua pri tiu ĉi perlo. Nun ankaŭ Xinhua trovis, ke tiu ĉi perlo estas plej konvena por ŝi. Ĉar tiu ĉi perlo distancas de ŝi plej proksime kaj ŝi povas vidi lin plej klare. Ŝi laboris en tiu taĉmento jam plurajn jarojn, kaj ŝajnis al ŝi, ke tio estas destinita kaj nehazarda.

Kiam afero evidentiĝis, oni pensadis pli profunde, pli vaste kaj pli detale . . . Multaj pasintaj okazaĵoj, kiujn ne akompanis ŝia aparta sento, nun vekis ĉe ŝi amon. Ŝi rememoris sian unuafojan renkontiĝon kun Guoming: Foje ŝi reveturis el la gubernia urbo per traktoro. Ĉe la vilaĝfino estis akuta ĝirejo. Pro tro granda rapideco la traktoro deviis de la vojo kaj estis baldaŭ puŝiĝonta kontraŭ grandan arbon apud la vojo. Guste en tiu momento Guoming, kiu estis vektportanta pajlon, fulmorapide alkuris kaj ĵetis pajlogarbon inter la arbon kaj la traktoron. La pajlogarbo mode-

rigis la kunpuŝiĝon de la traktoro kontraŭ la arbo. Kaj dank' al tio la traktoro kaj la homoj sur ĝi restis sekuraj. En la okazaĵo spite al la danĝero Xinhua rapide kuris al Guoming, kiu falis sur tritikan kampon post la arbo. Ŝi helpis lin restariĝi, forbatis de sur lia vesto polvon kaj ĝojis, ke li ne vundiĝis. Ankaŭ alia afero revenis en ŝian memoron: Tio okazis antaŭ la pasinta jaro. Oni estis elpumpanta akvon el rivereto por kapti fiŝojn. La akvonivelo malaltiĝis kaj la tubo de la pumpilo ne povis atingi la akvosurfacon. Tiam oni devis fosi sulkon sur la riverfundo. Sed la temperaturo estis 7°C sub la nulo, kaj sur la rivero la glacia tavolo estis disrompita kaj knare interpuŝiĝis. Neniu volis malsupreniri kaj iu proponis rekompenci la volontulon per brando. En tiu tempo venis Guoming. Li demetis la ŝuojn kaj senhezite iris en la glacian ŝlimon rifuzante la rekompencon. En tiu vespero Xinhua vizitis Guoming por demandi lin, ĉu frostiĝis liaj piedoj. Iu malgranda afero estis por ŝi aparte kortuŝa: Guoming donacis al ŝi paron da ŝuoj plektitaj el fragmitaj panikloj, kiujn li mem faris. La ŝuoj estis delikataj kaj komfortaj, tiaj estis malfacile aĉeteblaj en bazaro. Tiu paro da ŝuoj servis al ŝi du vintrojn. En multaj vintraj noktoj ŝi kunvenis en ili kaj neniam sentis froston en la piedoj kaj

ĝis nun ili ankoraŭ estis bone konservataj sub la lito. Xinhua eĉ rememoris sian senton en la tempo de fianĉiĝo de Guoming, ŝi vere sentis ĉagrenon, kvazaŭ ŝi perdis perlon.

Kaj se nun oni forĵetas la perlon, rigardante ĝin sablero, ĉu decas, ke ŝi prenŭ ĝin?

En la sekvanta tago ŝi iris al Onklino Li por trankviligi ilin, ke ŝia kuzino decidis ne prokrasti la gefianĉiĝon. Sed enirinte la domon, ŝi sentis, ke ŝia koro ekbatis pli forte, varmiĝis la vangoj. Ŝi penis kvietigi sin dum parolo kun Guoming, sed tamen ŝi trovis sian voĉon ŝanĝita. Ŝi penis rigardi Guoming kiel kutime, sed ŝi neniel povis levi la okulojn. Ŝia koro diris al ŝi, ke tute ne ekzistas la problemo "preni aŭ ne", ankaŭ ŝi, kiel ŝia kuzino, povas trankviligi la familion de Onklino Li.

La informo de ŝia kuzino estis konstatita: la fianĉino de Guoming sin turnis al alia viro. "Atendi 5 jarojn" estis ŝia preteksto. Ŝi intencis atribui la rifuzon al Guoming, sed fine ŝi mem estis timigita, ĉar Guoming konsentis atendi 5 jarojn. Post la intensa aŭtuna rikolto la svatinto venis al Onklino Li kaj promesis kompensi la elspezon por la gefianĉiĝa ceremonio.

Tion jam antaŭvidis Onklino Li. Ankaŭ Guoming konsentis kun la svatinto senhezite. Post longa silento Onklino Li diris lante en veo: "La knabino estas kompatinda, ŝi estas tro facilanima."

Rapide finiĝis la afero. Sed Guoming devis svatiĝi denove. La granda patrineco turmentis Onklinon Li. Pro tio ŝi longe ne povis trankviligi sin. Ŝi tute

ne atendis, ke ĝuste en tiu tempo perlo tre brila memvole venos en ŝian domon. Ho vivo, kian magian rolon vi ludas en la ekscito de la sentoj de homoj! Vi devas pardoni Onklinon Li pro ŝia maljuneco kaj montri al ŝi antaŭsignon, por ke ŝi ne svenu informiĝinte pri la apero de la perlo en ŝia hejmo.

V

Antaŭlonge Xinhua jam komprenis, ke ŝia decido elekti la perlon estas tute ĝusta. Se ŝi ne prenŭ ĝin, ĝi neniam venus en ŝian sinon. Sed tuj kiam estis venonta la tempo por ŝi preni ĝin, ŝi falis en ian ĝenatecon. Ĉu decas, ke fraŭlino iniciate montras sian amon al fraŭlo? Kaj cetere, Guoming estas sensprita kaj eĉ ne povas kompreni duondirojn. Ĉu ŝi petu sian kuzinon fari svatadon? Se tiel, do sekvas ridindaĵo: ke direktantino pri virinaj aferoj ne havas kuraĝon montri sian amon al tiu, kiu al ŝi plaĉas. Estas pli bone, ke ŝi mem provu.

Ĉiun tagon ili havis ŝancon vidi unu la alian kaj ŝajne ĉiutage troviĝis ankaŭ ŝanco por klarigi la aferon, tamen ŝi ne sukcesis, ĉar Guoming tute ne havis tian penson kaj neniam havis la volon resti sola kelkan tempon kun ŝi. Li ofte troviĝis inter la amasoj kaj foriris, kiam ili disiĝis. Kaj Xinhua ne povis ĉiuminute sekvi lin, kaj post unu monato ŝi ankoraŭ ne trovis konvenan ŝancon por montri sian amon.

Fine venis la ŝanco nerimarkite donita de la vivo.

Estis malluma nokto. La vilaĝanoj rigardis filmojn en najbara vilaĝo. La duan filmon Xinhua jam rigardis antaŭe kaj foriris

post la unua filmo. Ŝi intencis helpi la vidvinon Onklinon Shen senŝeligi rizon. Ŝi vektoportis rizon al la prilaborejo kaj tie ŝi devis vicatendi. Post nelonge ankaŭ Guoming venis, vektopotante rizon. Li ŝajnis tre ĝoja, kaj antaŭ ol Xinhua lin salutis, li jam ŝin alparolis: "Prilaboro de la greno por Onklino Shen ja estas mia tasko, kial vi kaptis ĝin en vian manon?"

Xinhua estis tre gaja kaj diris plaĉivole: "Nu, mi ne kaptos vian laboron, mi portos la rizon returne kaj vi reportu ĝin!" Sed ŝi pensis en si: "Jen, denove sama ideo venis al ni!"

Silentante pri ŝia ŝerco, li nur diris: "Ne tiel faru. Vi restu ĉi tie kaj mi iru alporti la ceteran rizon." Kaj tion li plenumis per du fojoj.

Post senŝeligo Guoming diris: "Vi restu ĉi tie por gardi la grenon kaj mi reportu ĝin."

Sed Xinhua malkonsentis: "Sume ok sakoĵ, do ni finportu ilin per du fojoj." Tion dirinte, ŝi tuj surŝultrigis du sakoĵn da rizo.

Ŝi revenis al la prilaborejo senŝarĝe. Ŝi volis dumvoje malkaŝi sian penson al li. Sed li iris fluge kaj ŝi ne kaptis ŝancon. Duonvoje de la dua fojo venis al Xinhua ideo, ke eble ne estos tia konvena ŝanco, se ŝi ne kaptos ĝin por malkaŝi la aferon. Ŝi fine decidis halti survoje, ŝajnigante sin laca. Ŝi pensis, ke Guoming certe haltos kaj atentos ŝin. Sed ekster ŝia atendo, li ne haltis. Li diris al ŝi: "Vi ne portu plu. Mi portos sola returne kaj poste portos anstataŭ vi." Tion dirinte, li forkuretis pli haste.

"Bone, vi tiel faru!" koleriĝis Xinhua.



Ilustrita de **QIN LONG**

Antaŭ ol pasis 20 minutoj, Guoming revenis fluge. Li sin pretigis transpreni la ŝarĝon de Xinhua.

Sed Xinhua sidis sur la grensako silente kaj senmove.

“Lasu min porti. Mi havas forton por tio,” Guoming diris sincere.

Xinhua ekridis kaj diris: “Vi estas forta, sed mi tute laciĝis. Vi portu do ankaŭ min!”

“Tion mi facile plenumos. Mi portos samtempe vin kaj la grensakojn.”

Xinhua sidis sur la sako senmove kaj diris lace, iom kolere: “Tio kaŭzos al mi malkomforton.

Vi portu min surdorse!” Tion dirinte, ŝi tuj sentis honton.

Guoming tute ne komprenis ŝin kaj diris mirigite: “Kial vi ankoraŭ portas, kiam vi estas malsana? Kial vi ne diris frue? Mi venigu sanitariston, li vicatendas senŝeligon en la prilaborojo.” Li estis ekironta.

Xinhua ekkonsciis, ke por li ŝia lango estas senutila. Ŝi subite stariĝis kaj kriis: “Haltu, mi ne bezonas sanitariston.”

Guoming miris: “Li estas ne malproksime.”

Xinhua levis la vekton kaj diris: “Vi iru for, mi havas forton porti.”

Rimarkinte ŝin kolerigita, Guoming diris tuj: “Se vi ne volas sanitariston, mi ne venigos; sed vi ne devas porti. Tion mi plenumos.” Li kaptis la vekton kaj tenis ĝin firme.

Xinhua vere koleriĝis pro lia stulteco kaj reprenis la vekton. Ili ambaŭ konkuris pri la vekto. Guoming estis pli forta kaj li tiris al si la vekton tre facile, kaj Xinhua, kiu estis tenanta la alian ekstremon de la vekto, falis en lian sinon.

“Aĥ, aĥ . . .” Guoming kriis mallaŭte kaj estis helponta ŝin stariĝi, sed ŝi tordis sian korpon kaj firme premis sin al Guoming.


Nur en tiu momento Guoming ekkomprenis la aferon. Li rememoris multajn okazintaĵojn. En la lastaj jaroj, krom lia patrino, ankaŭ Xinhua estis plej bone konata, respektata kaj amata de Guoming. Por li edziĝi al alia knabino vere estis turmente, kaj li ne povis imagi eĉ en sonĝo, ke ŝi amas lin kaj li havas kuraĝon ami ŝin. Lia koro forte ekbatis kaj liaj okuloj eklarmis. Li vere volis pardonpeti, ke li longe ne komprenis ŝin. Li ne sciis, kiam la vekto glitis el lia mano. Li tre milde kaj karese ĉirkaŭprenis ŝin.

Baldaŭ okazis nuptoj. Xinhua kaj ŝia kuzino ambaŭ edziniĝis al la fratoj Li en la sama tago.

Nur en tiu tago oni trovis la aferon vera. Parto de la vilaĝanoj opiniis, ke ili faris prave, kaj la alia parto diris, ke la afero okazis neatendite.

Tiaj opinioj estis tre signifaj. Ĉiu homo havas sian vivon, kaj en ĉia vivo okazas afero bona sed neatendita. Do atendu!

(Fino)



EL ĈINA MODERNA HISTORIO

LA UNUA KUNLABORO INTER KUOMINTANGO KAJ LA KOMUNISTA PARTIO DE ĈINIO

de TINGXIAO

POST sia fondiĝo la Komunista Partio de Ĉinio energie laboris por antaŭenpuŝi la laboristan movadon kaj kolekti klasajn fortojn por meti politikajn kaj sociajn fundamentojn por la partia gvido super la ĉina revolucio; kaj samtempe ĝi komencis starigi kontakton kun Kuomintango por organizado de revolucia unuecfroto.

Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, de januaro de 1922 ĝis februaro de 1923 okazis pli ol 100 strikoj kun partopreno de pli ol 300,000 ĉinaj laboristoj, kaj tiel aperis la unua alta tajdo de la laborista movado de Ĉinio. En februaro de 1923 eksplodis la mondsdua striko de la 7-a de februaro sur la Beijing (Pekino)-Hankou-a Fervojo. La striko estis sange subpremita de militaristo Wu Peifu, tamen la heroismo de la laborista klaso kaj ĝiaj sufiĉe granda organizita forto kaj revolucia aktiveco montritaj en ĝia batalo skuis la tutan landon kaj multe levis la prestiĝon de la Komunista Partio de Ĉinio en la ĉina popolo. Kaj la sanga okazaĵo mem instruis al la Komunista Partio de Ĉinio, ke

por renversi la regadon de imperiismo kaj la ĉina reakciularo, la laborista klaso devas establi, kune kun la kamparanaro, etburĝaro kaj nacia burĝaro, vastan kontraŭimperiisman kaj kontraŭfeŭdisman nacian unuecfroton.

Ĉar la de Sun Zhongshan (Sun Jatsen) gvidata Kuomintango estis kompleksa en konsisto kaj malkompakta en organizo, multaj el ĝiaj membroj kapitulacis al la imperiistoj kaj la nordaj militaristoj post la malvenko de la Revolucio de 1911. La sekto kun Sun Zhongshan ĉe la kapo persistis en la naciisma starpunkto kaj staris kontraŭ la registaro de la nordaj militaristoj. Tamen la batalo gvidata de li suferis sinsekvajn malvenkojn pro manko de ĝusta revolucia vojo.

Post la malvenko de la unuafoja defendo de la Konstitucio* en junio de 1918, Sun Zhongshan forlasis Guangzhou (Kantonon) kaj venis al Shanghai (Ŝanhajo). Lin inspiris la venko de la Oktobra Revolucio kaj lin tuŝis la Movado de la 4-a de Majo. Tiam li sentis la forton de la popolo kaj alinomis, en

oktobro de 1919, la Ĉinan Revolucionan Partion la Ĉina Kuomintango. Sed tiu ŝanĝo ne povis havigi novan vivon al tiu malkompakta politika organizo. Sun Zhongshan trovis nenian rimedon por batali kontraŭ la militaristoj, kiuj havis potencon armitan forton kaj solidan bazon de feŭda socio.

Dum la Milito inter Zhili- kaj Anhui-klikoj** en oktobro de 1920 Chen Jiongming kaj aliaj elpelis el Guangdong-provinco la militaristojn de Guangxikliko, kaj la armeanoj kaj la popolanoj de Guangdong volis revenigi Sun Zhongshan. Komence de 1921, Sun revenis al Guangzhou, enoficiĝis kiel speciala prezidanto kaj komencis la duafojan defendon de la Konstitucio. Li starigis stabojn en Guilin kaj Shaoguan kaj aktive faris preparojn por norden-ekspedicio. Sed instigate de la imperiistoj kaj la militaristoj de Zhili-kliko, Chen Jiongming bombardis la oficejon de la prezidanto en la vespero de la 16-a de junio, 1922, kaj per tio montris sian publikan perfidon kontraŭ Sun Zhongshan. Sun fuĝis alivestita en la

militŝipon Chuyu ankritan ĉe Bai'etan. La sekvantan frumantenon li kaj lia edzino Song Qingling kune ascendis la militŝipon Yongfeng por kontraŭataki la ribelulojn. La 9-an de aŭgusto li devigite forlasis Guangzhou pro manko de helptrupoj kaj veturis al Shanghai.

Post la perfido de Chen Jiongming, Sun Zhongshan ekkonsciis, ke estas neirebla la vojo ataki unu militariston per alia kaj oni devas serĉi novan revolucian forton kaj vojon. Sed kio estas nova forto kaj kie troviĝas nova vojo? Li dronis en ĉagreno kaj hezito. Kaj en tiu tempo li akiris helpon de la Komunista Partio de Ĉinio.

La ĉinaj komunistoj donis grandan atenton al la revoluciaj aktivecoj de Sun Zhongshan. Jam en la fino de 1921 Li Dazhao rekomendis Maring, reprezentanton el la Komunista Internacio, pere de Lin Boqu al Sun Zhongshan kaj Maring vizitis lin en Guilin de Guangxi, kaj prezentis al li proponon starigi politikan partion unuiĝantan kun la revoluciaj klasoj, precipe kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, kaj fondi oficiran lernejon. La retiriĝo de Sun Zhongshan al Shanghai koincidis kun la publikigo de "La Unua Opinio pri la Aktuala Situacio" kaj la "Deklaracio de la Dua Kongreso" fare de la Komunista Partio de Ĉinio. La du dokumentoj analizis la tiaman situacion enlandan kaj internacian kaj la politikan kaj ekonomian staton de la ĉina socio kaj montris, ke la malpacoj en Ĉinio fontas el la imperiistoj kaj la feŭdaj militaristoj. La dokumentoj elmetis la bazan taskon de la revolucio — elimini la internajn militojn, faligi la militaristojn, starigi enlandan




En oktobro de 1923, Sun Zhongshan kunvokis kunvenon por reorganizi Kuomintangon. La foto montras ke li (dekstre fronte) kaj Li Dazhao (maldekstre fronte) iras el la kunvenejo.

pacon, fini la subpremadon de la internacia imperiismo, efektiviĝi plenan sendependiĝon de la ĉina nacio kaj unuigi Ĉinion en veran demokratian respublikon. Ĝi montris ĝustan vojon por la emancipiĝo de la ĉina popolo. La dokumentoj ankaŭ eksplicite prezentis la opinion pri establo de unuecfroto kun Kuomintango sub la gvido de Sun Zhongshan. La Dua Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio aparte faris la rezolucion pri demokratia unuecfroto. Ĉio ĉi havigis al la ĉagreniĝinta kaj hezitantanta Sun Zhongshan klaran konon pri la perspektivo de la revolucio kaj komprenis

al li, ke estas tute ĝusta la kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma revolucia slogano de la Komunista Partio de Ĉinio.

En la dua tagdeko de aŭgusto, 1922, la Komunista Partio de Ĉinio kunvokis specialan kunvenon sur la Okcidenta Lago de Hangzhou (Hangĝoŭ), en kiu estis pridiskutata la problemo kiel kunlabori kun Kuomintangon. La kunveno decidis, ke komunistoj povas aliĝi individue al Kuomintango, kaj postulis, ke ĝi sin reorganizu. Post la kunveno Li Dazhao vizitis Sun Zhongshan en Shanghai, laŭ la decido de la Partio. Ili diskutis pri la problemoj kiel vigligi



*K-do Zhou Enlai,
direktoro de la poli-
tika departemento de
la Huangpu-a Oficira
Lernejo*

Kuomintangon por prosperigi Ĉinion kaj pri aliĝo de komunistoj al Kuomintango.

En la sama tempo reprezentanto de la sovetia registaro A. Joffe venis de Beijing al Shanghai. Akompanate de Li Dazhao kaj Lin Boqu, li interparolis kun Sun Zhongshan por ses tagoj kaj pluapase interkonsiliĝis pri reorganizado de Kuomintango, fondo de revolucia armeo kaj helpo de Sovetunio al la ĉina revolucio. Por eviti ĝenadon kaj subfosadon de la imperiistoj kaj reakciuloj, Sun Zhongshan sendis Liao Zhongkai kaj A. Joffe al Japanio, ke ili daŭrigu la interparoladon. En la unua tagdeko de septembro, 1922, Sun Zhongshan kunvokis kunvenon pri la plano de reorganizado de Kuomintango ĉeestitan ankaŭ de komunistoj.

En januaro de 1923 Liao Zhongkai kaj A. Joffe revenis al Shanghai. Sun Zhongshan intervidiĝis kun ili, kaj je la 26-a de la sama monato publikiĝis la kuna deklaro de Sun Zhongshan kaj A. Joffe. De tiam granda ŝanĝo okazis al la penso de Sun Zhongshan.

En tiu tempo Chen Jiongming estis elpelita el Guangzhou, kaj Sun Zhongshan rekonstruigis en februaro sian oficejon de generalisimo. En Guangzhou, krom aktive fari preparan laboron por reorganizi Kuomintangon, li ankaŭ sendis militan delegacion al Sovetunio por esploro kaj invitis sovetiajn politikajn kaj militajn konsilantojn al Guangzhou por helpi Ĉinion en ĝia revolucio.

Por diskuti kaj decidi la politikon pri unuecfroto, la Komunista Partio de Ĉinio kunvokis en Guangzhou, en junio de 1923, sian Trian Tutlandan Kongreson, kiun ĉeestis Li Dazhao, Mao Zedong, Qu Qiubai, Cai Hesen kaj aliaj 26 komunistoj. Post akra diskutado la kongreso aprobis la "Rezolucion pri la Nacia Movado kaj Problemo de Kuomintango" kaj oficiale decidis kunlaboron kun Kuomintango kaj aliĝon de komunistoj al Kuomintango kiel individuoj. La rezolucio montris, ke en la kunlaboro inter la du partioj la komunistoj devas firme teni siajn proprajn vidpunktojn en politiko kaj samtempe sian sendependecon en organizo.

En oktobro de 1923 Sun Zhongshan kunvokis kunvenon por reorganizi Kuomintangon kaj establis provizoran centran plenuman komitaton kun partopreno de komunistoj. En novembro publikiĝis deklaro pri

reorganizado kaj projekto de la partia programo. La 20-an de januaro, 1924 la Ĉina Kuomintango kunvokis sian Unuan Tutlandan Kongreson en Guangzhou. Ĝin ĉeestis 156 reprezentantoj, inkluzive komunistojn Li Dazhao, Tan Pingshan, Lin Boqu, Mao Zedong kaj Qu Qiubai, kiuj estis senditaj aŭ elektitaj kiel reprezentantoj. Li Dazhao estis elektita kiel membro de la prezidantaro.

La reorganiza laboro de Sun Zhongshan ĉiam estis malhelppata kaj subfosata de la kuomintangaj dekstruloj. En la kongreso la kuomintangaj dekstruloj intencis detruiri alian politikon pri alianco kun Rusio kaj kunlaboro kun la Komunista Partio de Ĉinio, sed dank' al la subteno de Liao Zhongkai kaj aliaj kuomintangaj maldekstruloj kaj la helpo de la ĉina komunisto Li Dazhao kaj la sovetia konsilanto M. M. Borodin, la kongreso atingis plenan sukceson. La kongreso aprobis la "Deklaracion de la Unua Tutlanda Kongreso de la Ĉina Kuomintango", akceptis la politikan proponon de la Komunista Partio de Ĉinio pri batalo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, reinterpretis la Tri Popolajn Principojn de Sun Zhongshan kaj adoptis la politikon pri alianco kun Rusio, kunlaboro kun la Komunista Partio de Ĉinio kaj helpo al la laboristoj kaj kamparanoj. La kongreso ankaŭ aprobis la decidon akcepti en Kuomintangon komunistojn kaj membrojn de la Socialisma Junulara Ligo kiel individuajn membrojn. Krom Liao Zhongkai kaj aliaj kuomintanganoj, ankaŭ komunistoj Li Dazhao, Mao Zedong, Qu Qiubai, Lin Boqu kaj aliaj estis nove elekti-

taj kiel membroj aŭ alternaj membroj de la Centra Plenuma Komitato de Kuomintango. Tiu kongreso markis la stariĝon de la unua kunlaboro inter Kuomintang kaj la Komunista Partio kaj la formiĝon de la revolucia unuecfronto de ambaŭ partioj.

Jam dum la unua kongreso de Kuomintang, Sun Zhongshan komisiis al Liao Zhongkai kaj Deng Yanda fari preparon por fondi oficiran lernejon, difinis Huangpu kiel sidejon de la lernejo kaj starigis ĉe Nanti de Guangzhou preparon oficejon por tio. Jiang Jieshi (Ĉiang Kajšek) estis unu el la ĉefaj respondeculoj pri fondo de la oficira lernejo, sed li restis en Shanghai je ia preteksto. Liao Zhongkai plurfoje telegrafis al li por urĝi lin reveni al Guangzhou, kaj la lasta faris tion nur post la fondiĝo de la lernejo. Dank' al la klopodado de Liao Zhongkai kaj ĉinaj komunistoj, fondiĝis en majo la Huangpu-a Oficira Lernejo, kia neniam antaŭe aperis en la ĉina revolucia historio. La Komunista Partio de Ĉinio sendis multajn el siaj anoj kaj membroj de la Socialisma Junulara Ligo al la lernejo por lerni kaj ankaŭ Zhou Enlai, Ye Jianying, Yun Daiying, Xiao Chun, Nie Rongzhen kaj aliajn kamaradojn por labori. Zhou Enlai prenis sur sin gravan oficon de direktoro de la politika departemento kaj faris sian kontribuon al la konstruado de la lernejo.

Post starigo de la kunlaboro inter la du partioj, la granda revolucia movado de la ĉina popolo disvolviĝis rapide en senprecedenca skalo. La ĉina laborista movado antaŭenruliĝis impete, kaj la kamparana movado vigle disvolviĝis. La

revolucia registaro de Guangdong subpremis la reakcian armitan organizon de komercistoj kaj la kontraŭrevolucionan ribelon de Yang Ximin kaj Liu Zhenhuan*** kaj komencis la unuan orienten-ekspedicion kontraŭ Chen Jiongming. En julio de 1925 la Guangdong-a Registaro alinomiĝis la Nacia Registaro kaj fondis la Nacian Revolucian Armeon kun lernantoj de la Huangpu-a Oficira Lernejo kiel spino. En oktobro la Nacia Revolucia Armeo faris la duan orienten-ekspedicion, ekstermis la militaristojn en Guangdong kun Chen Jiongming kiel ĉefo, unuigis kaj firmigis la revolucian bazlokon de Guangdong kaj pavimis la vojon por la venko de la sekvanta norden-ekspedicio.


** En 1911 Sun Zhongshan publikigis la "Provizoran Konstitucion de la Respubliko de Ĉinio" kun karak-*

tero de burĝa konstitucio, kiu temis ĉefe pri kabineta sistemo kaj parlamenta elektado. Poste ĝi estis ŝirita de la nordaj militaristoj. Sun Zhongshan alvokis en Guangdong defendon de la Konstitucio por stari kontraŭ la politika potenco de la nordaj militaristoj.

*** La nomita milito estis lukto inter du grupoj de la nordaj militaristoj. Zhili-kliko reprezentis la fortojn de Britio kaj Usono, kaj Anhui-kliko tiujn de Japanio. Post kiam Sun Zhongshan komencis defendon de la Konstitucio en septembro de 1917, Anhui-kliko pledis por milito kun Sun, sed Zhili-kliko por paco kun li. En 1920 okazis milito inter la du klikoj, kiu finiĝis per malvenko de Anhui-kliko.*

**** En la tria tagdeko de majo, 1925, Yang Ximin kaj Liu Zhenhuan, Yunnan-Guangxi-aj militaristoj postenantaj en la regiono de Guangzhou, ekribelis subtenate de la brita imperiismo kaj la registaro de Duan Qirui. Kaj la ribelo estis subpremita de la revolucia armeo en la dua tagdeko de junio tiujare.*

Lernantoj de la Huangpu-a Oficira Lernejo en la periodo de kunlaboro inter Kuomintang kaj la Komunista Partio de Ĉinio





AL LA OLIMPIKOJ EN 1980

En la Dua Azia Virina Flugpilka Ĉampioneca Konkurso okazinta en Hongkong, la ĉina virinaflugpilka teamo venkis per 3 kontraŭ 1 la japanan virinanflugpilkan teamon, kiu sesfoje gajnis mondan ĉampionecon, kaj per 3 kontraŭ 0 la sudkorean teamon, kaj tiamaniere gajnis la ĉampionecon de Azio.



La ĉina virinaflugpilka teamo gajnis la ĉampionecon de Azio.


En la Dua Azia Vira Flugpilka Ĉampioneca Konkurso okazinta en Barejno, la ĉina viraflugpilka teamo venkis la fortan rivalon la sudkoreanflugpilkan teamon kaj gajnis la ĉampionecon de Azio.

La ĉina vira korbopilka teamo venkis la sudkorean teamon en la azia vira korbopilka ĉampioneca konkurso kaj plue tenas la ĉampionecon de Azio.

La venkintaj ĉinaj vira kaj virinaflugpilka teamoj kaj la vira korbopilka teamo partoprenos en laflugpilka kaj korbopilka konkursoj de la olimpikoj de 1980 okazintaj en Moskvo.



La ĉina vira korbopilka teamo venkis la japanan viran korbopilkan teamon en la Deka Azia Korbopilka Konkurso.



Flugpilkestino Zhang Rongfang batas pilkon.

NOVAJ TEATRAĴOJ KAJ FILMOJ

Lastatempe, naŭ novaj teatraĵoj estas prezentitaj. La moderna dramo "Klariono je Tagiĝo" estis ludita de la Shanghai (Ŝanhaj)-a Dramo-instituto. La dramo "Ŝi" ludita de la Beijing (Pekin)-a Ensemblo kaj la dramo "Sekvu Min, Knabino" ludita de la Ĉina Porgeknaba Teatrotrupo priskribas respektive la komencon de nova vivo de iu virino kaj iu junulino post la 10-jara haoso. La ensemblo de Urumqi (Urumĉi)-aj trupoj kaj la Armea Muzika Trupo de ĈPLA kune ludis muzikaĵojn kaj la dancojn "Awaguli", "Printempo sub Neĝmonto" kaj "Stepo de Feliĉo".

Lastatempe sursceniĝis ankaŭ la nacia dancodramo "Princino Wencheng", kiu temas pri la historio de princino Wencheng de Tang-dinastio (618-907 p.K.), kiu edziniĝis al tibeta reĝo. Tiu teatraĵo estas kune verkita kaj ludita de la Ĉina Kantodanca Teatro kaj la Beijing-a Dancolerno. Fama dancistino Chen Ailian ludis la rolon de princino Wencheng kaj sukcese kreis figuron de bonkora, bela kaj talenta antikva

BALDAŬ APEROS "TAGIĜO DE LA HOMARO"

Post celebros de la 50-a datreveno de la malkovro de la unua kranio de la Pekina Homo ĉe Zhoukoudian (Ĝoukoŭdian) baldaŭ aperos la unua volumo de la Serio de Populara Scienco "Tagiĝo de la Homaro" aranĝita de la Shanghai-a Scienca kaj Teknika Eldonejo. Tiu verko kun fama paleoantropologo

Jia Lanpo kiel ĉefredaktoro enhavos 120,000 han-lingvajn ideografiaĵojn kaj pli ol 400 kolorajn ilustraĵojn.

Tiu verko prezentas vivece la aperon kaj vivon de la prahomoj. La riĉa enhavo de la verko inkluzivas bildojn kaj materialon ĝis nun ne aperintajn.



ĉina virino, kiu faris rimarkindan kontribuon por la solidareco inter la han-a kaj tibeta naciecoj. La kostumoj kaj dekoracioj de tiu teatraĵo estas riĉaj je nacia gusto.

Inter la lastatempe luditaj novaj filmoj sin trovas la biografia filmo pri la ĉina geologo "Li Siguang", la filmo "Post Fulmo de Blua Lumo" pri la feliĉa vivo de orfoj post tertremo, la filmo "Flugo de Hirundidoj" pri diligenta sinekzercado de sportistoj kaj la filmo "Larmoj en Neĝmontoj" pri la reakcia servuta sistemo en malnova Tibeto.

KOLEKTOJ DE ESEJOJ KAJ RAKONTOJ DE TAIWAN

Antaŭ nelonge, la Popola Literatura Eldonejo de Ĉinio aperigis la

du librojn "Elektitaj Eseoj de Taiwan" kaj "Elektitaj Rakontoj de Taiwan". En la unua kolektiĝis 32 artikoloj de 23 Taiwan-aj verkistoj pri sopiro al la hejmloko kaj karuloj, pri la vivo, moroj kaj sociaj aspektoj de diverstavolaj popolanoj de Taiwan kaj pri vizitindaj lokoj kaj lokaj kutimoj de tiu insulo. En la dua kolektiĝis 22 artikoloj de 16 verkistoj en pli ol 400,000 handlingvaj ideografiaĵoj. Iuj el la verkoj spegulas la vivon de Taiwan-aj malaltaj oficistoj, intelektuloj, komercistoj ktp., kaj aliaj priskribas hejmosopiron de niaj samlandanoj loĝantaj en Taiwan.



KORESPONDI DEZIRAS

.....
Duoblajn E-librojn (pli ol 600 div.) kaj insignojn interŝanĝas (aŭ favorepreze vendas) nur al seriozaj esperantistoj (serĉataj ankaŭ div. eldonoj de E-vortaroj) Marinko Ĝivoje, P.P. 5025, 41040 ZAGREB-Dubrava, Jugoslavio.
.....

* Franca emeritulo 64-j. dez. kor. pri ĉt. kun tutmondaj amikoj, precipe el Ĉinio, Azio kaj Nordkoreio. Interesiĝas pri popolkanta muziko, biki-kloamatorismo kaj ĉiutaga vivo. Gastigo senpaga en propra hejmo por eksterlandaj s-anoj. Adr.: A. Lagoutte, Le Hameau-au-Soleil, 66700 Argeles-Place, Francio.

* Buczkowski Waldemar, Lernanto 18-j., PL-08-440 Pilawa, Str. Aleja Wyzwolenia 234, Pollando, kun ĉinaj esp-istoj pri sporto kaj geografio.

* Rudolf Zsoldos, 2400 Subotica, Iv. Milankovica 29/B, Jugoslavio, pri muziko, turismo k kolektas bk k pk.

* S-ro Matsuno Yutaka, Sandaiji 2-E4-2, Otsu, Shiga, 520-21, Japanio, kun ĉino kiu kulturigas ĉinajn printempajn orkideojn.

* S-ro S. Kulimekin, 30-j. ĉino loĝanta en Tailando, kun amikinoj el Ĉinio, Danlando, Finnlando, Norvegio, Svedio kaj Islando. Adr.: G.P.O. Box 983, Bangkok, Thailand.

* Stefan Alexandru, 30-j. elektrikisto, kun ĉinaj kaj alilandaj esp-istoj pri montturismo, muziko. Adr.: C.P. 75-9, Bukareŝto, Rumanio.

* S-ino D. Luesken, Boerhaavestr. 82, 7316 LH. Apeldoorn, Nederlando, kun ĉina esp-istino.

* Jecza Tiberiu, 42-j. instruisto, Str. Muzelor nr. 1, Bl.

12, Sc. A, Ap. 49, R-4000 Sf. Gheorghe, Rumanio, kun ĉinaj geesp-istoj pri literaturo, arto, muziko, etnografio k kolektas ĵurnalojn, revuojn, librojn, diskojn k bk.

* Zygmund Stachurski, 24-j. ŝlosisto, 05-500 Piaseczno K/W-wy, ul. Kauna 12, Pollando, kun ĉinaj geesp-istoj.

* Blair Silverlock, 18-j. lernanto, 83 Grand Prom., Kr-rinyup 6018 W.A., Aŭstralio, kun ĉinaj k aliaj aziaj esp-istoj pri ĉiutaga vivo ktp.

* S-ro Heriau Maurice, 64, Rue des Moulins B3, 21000-Dijon, Francio, kun ĉina esp-ist(in)o pri kultura vivo, arto ktp.

* Marianne Bockmann, Muhlenstr. 8, D-2841 Steinfeld-Muhlen, FR Germanio, kun juna ĉina esp-isto pri kolektado, muziko, legado, orientazio.

“Walter” en Ĉinio

En novembro de 1979 okazis en Ĉinio semajno de jugoslavaj filmoj.


Iun tagon, la Jugoslava Filma Delegacio kaj ĉinaj spektatoroj kune rigardis, en kinejo de Beijing, “Partizana Eskadro”, unu el la kvin jugoslavaj filmoj projekciataj en la semajno. La ĉefrolulo en tiu filmo estas Velimir-Bata Zivojinoviĉ, estro de la Jugoslava Filma Delegacio. Kiam ĉinaj spektatoroj vidis tiun faman jugoslavan filman aktoron, ili intime nomis lin “Walter”!

“Walter” estas heroo ludita de Bata en la filmo “Walter Defendas Sarajevon”. Post projekciado de tiu filmo en Ĉinio antaŭ du jaroj, la figuro de tiu legenda partizano estis multe laŭdata de ĉinaj spektatoroj. Precipe junuloj tre ŝatas la heroon Walter.

La Jugoslava Filma Delegacio vizitis la urbojn Beijing (Pekino), Shanghai (Ŝanhajo) kaj Guangzhou (Kantono) de Ĉinio. Oni ĉie salutis lin nomante lin “Walter”.

Foje, kiam la delegacio venis al la plej movoplana strato Nanjing de Shanghai, subite iu kriis “Walter”. Pasantoj rapide ĉirkaŭis Bata kaj varmaj manoj etendiĝis al li. Ne havante ŝancon intervidiĝi kun li, kelkaj spektatoroj de aliaj lokoj do letere esprimis al li sian deziron, ke ilia vizito sukcesu. Iuj junpioniroj sendis sian foton al “Walter”. Ĉiufoje, kiam oni laŭdis Bata, li ĉiam diris modeste: “Mi

Jugoslava aktoro
Velimir-Bata Zivojinoviĉ
interparolas kun ĉina
aktoro Chen
Qiang.



estas aktoro kaj ne povas kompari min kun Walter.”

Bata kaj aliaj membroj de la delegacio vizitis ĉinajn filmostudiojn kaj diskutis kun ĉinaj kolegoj pri prezenta arto. Dum sia vizitado al la Shanghai-a Dublaja Studio, ili multe laŭdis ĝiajn laborantojn pro ilia diligenta laboro. Bata diris, ke “Walter” akiris tiel grandan famon en Ĉinio, tio ŝuldiĝas al la laborantoj de la studio, precipe al ĝiaj dublantoj.

Bata estas eminenta artisto. Ĉar li ofte ludas la rolon de partizano, vaste cirkulas en Jugoslavio anekdoto, ke li petis de Marŝalo Tito militistan rangon. Kiam iu ĵurnalisto demandis lin pri tio, li diris ridetante: “Kamarado Tito estas tre afabla, antaŭ li ni neniom nin ĝenas. Iufoje mi ŝercis kun li, dirante: ‘Marŝalo Tito, multaj kamaradoj akiris militistan rangon post la Kontraŭfaŝista Milito de nur 4 jaroj, sed mi batalis kontraŭ malamikoj pli ol 20 jarojn, vivofaris pli ol 50 fojojn kaj mortigis sennombrajn malamikojn, sed ĝis nun mi ankoraŭ ne akiris militistan rangon.’ Tito diris kun rideto: ‘Se vi estus mitralisto en la milito, eble delonge vi jam estus generalo. Sed aktoro de

filmoj neniam fariĝos generalo. En tio ankaŭ mi ne povas helpi vin!’ ”

La nomita delegacio paŝigis du semajnojn en Ĉinio kaj ricevis varman bonvenigon de la ĉina popolo. Bata diris kun profunda emocio, ke jam delonge li deziris viziti la grandan, antikvan, malproksiman kaj belan landon, nun lia deziro realiĝis, kaj li sentis honoron pro tio. La ĉinaj popolanoj ŝatas “Walter”, kaj li Ĉinion.

MONDFAMA VIOLONISTO Y. MENUHIN EN ĈINIO

Invitite de Lu Ji, prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Muzikistoj, mondfama violonisto Yehudi Menuhin faris 10-tagan viziton al Ĉinio en decembro de 1979. S-ro Y. Menuhin kaj la Simfonia Orkestro de la Centra Filharmonio de Ĉinio en kunlaboro sukcese faris, post preparado de 4 tagoj, tri prezentojn. Ili ludis la “Violonan Konĉerton en A Majora” de Mozarto, la “Violonan Konĉerton en D Majora” de J. Brahms, la “Violonan Konĉerton en E Majora” de Jean-Sebas-

tien Bach kaj la "Violonan Konĉerton en D Maĵora" de Betoveno. Dank' al ilia eminenta prezentado, muzik-amantoj de Beijing ĝuis belan muzikon.

Dum sia vizito al Ĉinio, s-ro Y. Menuhin montris profundan prizorgon al la muzika afero de Ĉinio kaj amon al ĝiaj junaj muzikistoj. Li faris du-tagan instruadon al ĉinaj junaj violonistoj. En la nomo de la Internacia Interhelpa Fonduso de Muzikistoj, li donacis al ĉinaj muzikistoj bonkvalitan violonon faritan de usona eminenta muzikil-faranto B.V. David. Li montris grandan entuziasmon al trejnado de ĉinaj junaj violonistoj, aŭskultis ludon de 16 10-29-jaraj violonaj lernantoj kaj ludistoj de la Centra Konservatorio, la Shanghai-a Konservatorio, la Centra Filharmonio kaj la Shanghai-a Simfonia Orkestro kaj mire ĝojis pro ilia muzika talento.

LA MAORI-A KANTA KAJ DANCA GRUPO DE NOVZELANDO EN ĈINIO

En decembro de 1979, la Maori-a Kanta kaj Danca Grupo de Novzelando vizitis Ĉinion kaj faris sep prezentojn sinsekve en Guangzhou, Nanĵing (Nankino) kaj Beijing. La artistoj prezentis, per originalaj belaj muzikaĵoj kaj dancoj kun klaraj ritmoj, al spektatoroj ritojn de maori-oj por distingi malamikojn de amikoj, interŝanĝi donacaĵojn kaj regali gastojn. Ilia sukcesa prezentado rikoltis longajn varmajn manklakadojn de ĉinaj spektatoroj.

La kulturo de la maori-oj havas historion de pli ol mil jaroj. Per muziko, dancoj, skul-

ptajoj kaj gravuraĵoj, la maori-oj konservas siajn historion, genealogion, religiajn kredojn kaj mo-
rojn.

Dum sia vizito al Ĉinio, arta direktanto de la grupo Kingi Matutaeru Ihaka donacis, en la nomo de la maori-oj kaj la novzelanda popolo, al ĉinaj gvidantoj, modelon de antikva piroga pruo.

La Maori-a Kanta kaj Danca Grupo de Novzelando en prezentado en Beijing



Vicĉefministro Chen Muhua rigardis la prezentadon de la grupo kaj intervidiĝis kun ĝiaj geaktoroj. En marto de 1979, kiam ŝi vizitis la regionon loĝatan de maori-oj, ŝi ricevis varman regalon de la maori-a popolo. Ŝi petis s-ron Ihaka transdoni ŝian varman saluton al la maori-a reĝino kaj ŝian saluton al ĉefministro Muldoon kaj vicĉefministro Talboys.

EKSPOZICIO DE PENTRAĴOJ DE ĈINAJ KAJ JAPANAJ INFANOJ

En Shenyang malfermiĝis lastatempe al la publiko la Ekspozicio de Infanaj Pentraĵoj de la Ĉina Urbo Shenyang (Senjang) kaj la Japana Amagasaki. El la 129 eksponitaj verkoj sin trovis 49 pentraĵoj de infanoj de Amagasaki kaj la ceteraj estas pentritaj de ĉinaj infanoj. La verkintoj de tiuj pentraĵoj ĉiuj estas 6-12-jaraj infanoj. La naiveco kaj fantazieco de infanoj estis reaperigitaj per brilaj koloroj kaj kuraĝaj linioj. La infanoj kreis vivajn bildojn pri montoj, akvoj, floroj, herboj,

insektoj, fiŝoj, birdoj kaj bestoj per diversaj artaj formoj, kiaj ĉinstila pentrarto, paŝtelo, akvarelo, guaŝo kaj olea pikturo. Interalie iuj pentraĵoj montras amikecon inter la popolanoj kaj infanoj de Ĉinio kaj Japanio.

Laŭ propono de la urbestro de Amagasaki, 59 verkoj de infanoj de Shenyang estis eksponitaj en la Internacia Ekspozicio de Pentraĵoj de Infanoj funkciigita de la Sinteza Kultura Centro de Amagasaki en la dua tagdeko de la lasta oktobro.

Lastatempe, multaj legantoj varme laŭdis nian gazeton per leteroj, ke ĝi havas kompare abundan enhavon, pli belajn bildojn kaj informojn pri Esperanto. Tio multe kuraĝigis nin. Iuj legantoj prezentis al ni multajn bonajn proponojn kaj kritikojn. Ĉi tie ni kore dankas al niaj legantoj pro ilia subteno.

Sube estas niaj respondoj al parto de la demandoj de niaj legantoj:

Demando: Ĉu mi povos vidi artikolojn pri la historio de la ĉina Esperanta movado en via gazeto? Ĉu vi povas plimultiigi artikolojn pri Esperanto?

Respondo: En la lastaj du jaroj, nia gazeto jam raportis fragmentojn de la ĉina Esperanta movado. Estonte ni daŭre aperigos rememoraĵojn kaj unu artikolon por detale raportoj pri la ĉina Esperanta movado.

Ni grandigos la rubrikon "Esp-Novajoj" kaj aperigos en ĝi pli da artikoloj pri la Esperanta movado en kaj ekster nia lando. Ni faris novan rubrikon "Nia Kultivejo", dezirante, ke niaj legantoj verku por ĝi artikolojn pri studado de Es-

peranto. Ni ĝojas ricevi verkojn originalajn aŭ tradukitajn de niaj legantoj en Esperanto.

Unuvorte, por bone funkciigi la du nomitajn rubrikojn, ni arde deziras ke niaj legantoj multe skribu artikolojn por ni kaj bone kunlaboru kun ni.

Demando: Ĉu Esperanto estas instruata en ĉinaj lernejoj? Ĉu vi havas bonajn Esperantajn lernolibrojn aŭ helpajn librojn por Esperanto?

Respondo: Ĉirkaŭ la jaro 1966, en Ĉinio oni starigis Esperantan kurson en 11 altaj lernejoj. Poste, en la kultura revolucio la instruado de Esperanto en la altaj lernejoj estis ĉesigita. Nun, iuj altaj lernejoj preparas denovan instruadon de Esperanto. Ekzemple, la Orient-Ĉinia Normala Universitato preparas fondon de Esperanta kurso en la altaj klasoj de la fremdlingva fakultato kaj tiu de la ĉinaj lingvo kaj literaturo en la somero de la kuranta jaro. Krome, la Beijing-a Lingva Instituto, la Wuhan-a Universitato, la Sichuan-a Universitato, la Hangzhou-a Universitato k. a. jam starigis

libertempajn Esperantajn kursojn. Ankaŭ iuj mezlernejoj kaj elementaj lernejoj fondis tiajn Esperantajn kursojn.

Koncerne al lernolibroj de Esperanto, ili ne estas multaj en nia lando. Antaŭe oni eldonis "Plenan Vortaron Esperantan-Ĉinan", "Fundamentan Lernolibron de Esperanto", kiuj estas kompilitaj de Venlo Fon; "Nova Vortaro Esperanta-Ĉina" kompilita de la Ĉina Esperanto-Ligo; kaj "Esperanta Konversacio" kompilita de Laŭlum. En la lastaj jaroj Tikos kompilis "Fundamentan Lernolibron de Esperanto". Ankaŭ diverslokaj Esperantaj organizoj aŭ kursoj kompilis iujn legaĵojn kaj lernolibrojn. La nova "Esperanta-Ĉina Vortaro" kaj "Ĉina-Esperanta Vortaro" kaj "Esperanta Lernolibro" (por alta lernejo) estas en kompilado.

Demando: Kiom da esperantistoj via lando havas? Ĉu ĉinaj esperantistoj ŝatas korespondi kun okcidentanoj?

Respondo: Post la komenco de la kultura revolucio, la ĉina Esperanta movado en diversaj lokoj estis ĉesigita, pro tio estas malfacile fari precizan nombradon de la ĉinaj esperantistoj. Laŭ nekompleta statistiko, nuntempe Ĉinio havas ĉ. 2-3 milojn da esperantistoj. Ni kredas, ke kun la disvolviĝo de la Esperanta movado en diversaj lokoj de Ĉinio, certe ĉiam pli grandiĝos la nombro de niaj samideanoj.

Ĉinaj esperantistoj ĉiam ŝatas interkompreniĝi kun diverslandaj popoloj kaj korespondi kun ili. Multaj esperantistoj de nia lando esperas interŝanĝi en kulturo, scienco kaj tekniko kun ili por servi al la kvar modernigoj de la patrolando. Multe da Esperantaj grupoj aŭ individuoj

(Daŭrigo de p. 48)

LA INSULARO EN FANDIĜO

Oriente de Taimyr-duoninsulo en norda parto de Azio sin trovas la insularo Lyaĥov (konsistiga parto de la insularo Nov-Siberio), kiu havas tre interesan formacion. Ĉar ĝi situas sur la vasta kontinentbreto de Azio en la Arkta Maro, ĝi ŝajnas esti aro da solidaj terblokoj havantaj rilaton kun la kontinento. Sed efektive ne. Ĝia bazo konsistas el grandega glacipeco, sur kiu formiĝis tero el precipitaĵoj de la kvaternaro.

Sovetuniaj sciencistoj jam konstatis, ke glacio de Arkto degelas kaj retiriĝas norden. En iu observita regiono sola la areo de la degelinta glacio jam atingis milionon da kvadrataj kilometroj, kiu egalas preskaŭ la areon de du Francioj.

Pro la supre dirita kaŭzo la insularo Lyaĥov situanta sur tiu grandega glacia "soklo" alfrontas la sorton baldaŭ malaperi pro dege-lado.

de nia lando korespondas kun esperantistoj en Japanio, Jugoslavio, Francio, Britio, Okcidenta Germanio, Italio k.a.

Demando: Kial oni ne povas trovi amuzan humuraĵon en via gazeto? Ĉu orientanoj ne ŝatas amuzi sin?

Respondo: Same kiel la okcidentaj nacioj, ankaŭ nia popolo ŝatas spritaĵon kaj humuraĵon. Ĉina proverbo diras: "Rido junigas onin dek jarojn." Estas evidente, ke ĉinoj opinias ridon utila por la sano de homoj. En la ĉinaj antikva kaj

moderna literaturoj, diverslokaj dramoj kaj folkloraj literaturoj troviĝas multaj amuzaj humuraĵoj. Antaŭ dekelkaj jaroj, ankaŭ nia gazeto ofte aperigis amuzajn humuraĵojn. Poste, pro influo de ultramaldekstra linio, tiaj humuraĵoj forvaporigis el nia gazeto. Kaj pro la sama kaŭzo, literaturoj, kiuj priskribas amon, ankaŭ malaperis. Sed, tio absolute ne signifas, ke al ĉinoj ne plaĉas amuza verkaĵo. Nun, humuraĵoj, ironiaĵoj kaj verkoj pri amo aperas en diversaj ĵurnaloj kaj gazetoj de nia lando. Nia gazeto jam komencis aperigi rakontojn kaj

novelojn pri amo. Ekde la 1-a numero de la kuranta jaro, ni aperigas karikaturon. Estonte ni daŭre aperigos tiajn verkaĵojn.



Demando: Ĉu vi povas restarigi la rubrikon "Leciono de la Ĉina lingvo" en via gazeto?

Respondo: Por profundigi la amikecon kun la ĉina popolo, parto de la esperantistoj deziras lerni la ĉinan lingvon. Tiu deziro estas laŭdinda. Sed nun ni ne povas starigi la rubrikon pro malsufiĉo de redaktoroj. Sendube tio estas pardonebla afable de niaj karaj legantoj.

KARIKATURO



Ĉu mi ne kompetentas?



榮 1979.

Amo inter gekuracistoj



*pentrita de
JIANG FAN*



KURIOZAJ MONOJ

Sur iuj insuloj en Pacifiko kaj ĉe pluraj nacioj de Afriko oni prenas konkojn kiel monon. Iu speco de konko havas grandan valoron, ekzemple oni povas aĉeti 33 metrojn da kotona ŝtofo per 600 konkoj. Prilaboritaj konkoj ligitaj per ŝnuro ĝenerale povas esti uzataj kiel mono.

La loĝantoj sur la insularo Melanezio uzas hundodentojn kiel monon. Ili ĝenerale bredas hundojn kaj buĉas ilin por celebri festojn. Per unu hundodento oni povas aĉeti ĉirkaŭ 100 kokosojn kaj por akiri edzinon oni devas doni centojn da hundodentoj kiel donacon. En la lastaj jaroj iuj avaraj blankuloj portis en la insularon grandan nombron da hundodentoj por trompe interesanĝi ilin kun la indiĝenoj kontraŭ diversaj materialoj, kaj tio kaŭzis "inflacion".

Por sin defendi kontraŭ la trompistoj-blankuloj la melanezianoj uzas anstataŭe aliajn specojn de mono, inter kiuj la plej valoraj estas dentegoj de porko. Ju pli kurba porkodentego estas, des pli valora ĝi estas. Iuj el la dentegoj volviĝas en cirklojn, kaj eĉ en du cirklojn. Krome ili uzas ankaŭ ŝelon de heliko kiel monon. Ĝenerale la estroj de la triboj posedas plej multe da helikŝeloj.

Sur la insularo Polinezio zonoj kaj aliaj ornamaĵoj plektitaj el plumoj de kolibro, papago kaj kolombo servas kiel mono kun granda valoro. Ankaŭ sur iu alia insularo cirkulas mono farita nur el ruĝaj birdplumoj, kaj tiaj ruĝaj plumoj estas troveblaj nur sur la korpo de rara speco de papago.

Plej interese estas ke rondaj ŝtonoj kun truoj en la mezo estas uzataj

de la loĝantoj de Yap-insulo de Karolino en Pacifiko kiel mono. Tio ĉi monero nomiĝas cendo. Sed tiu cendo estas neportebla, ĉar ĝi estas "koloso". Laŭ leĝo de la loĝantoj, ju pli granda estas la diametro de cendo, des pli valora ĝi estas, kaj la diametro de iuj cendoj eĉ atingis 5 metrojn.

La grandega ŝtonmonero havas sian avantaĝon kaj ankaŭ mankon: Ĝi estas nek ŝteblebla nek portebla pro sia granda pezo. Kiam oni bezonas uzi ĝin por aĉeti ion, oni devas konduki la vendiston al la ŝtonmonero por rigardi kaj juĝi ĝian prezon. Pro malfacileco en transportado de tia monero vendisto ofte devas restigi la akiritan cendon en la antaŭa loko kiel sian "nemoveblan posedaĵon".

ETIKETO DE NEPALO

En Nepalo, por bonvenigi honorajn gastojn oni starigas arkojn unu post alia sur la vojo de aerodromo al hotelo. Ambaŭflanke de ĉiu arko metiĝas po ore brilanta latuna vazo kun fermentinta bovina lakto kaj ornamita per freŝaj floroj. Laŭ la moroj de Nepalo ĝi estas la plej solena ceremonio por bonvenigi gastojn.

La nepalanoj havas kutimon bruligi buteran lampon aŭ kandelojn dum gastigado. La delikate farita butera lampo havas altecon de 1 metro. En bankedo oni bruligas ruĝajn kandelojn, kio pliigas la intiman etoson de familio.

Kiam vi interparolas kun nepalaj amikoj, vi povas trovi, ke ili ofte skuas la kapon. Tio ne signifas, ke ili ne konsentas kun vi, male tio ĝuste montras ilian jeson. Kontraŭ nia kutimo, en Nepalo kapskuo esprimas jeson dum kapbalanco neon. Renkontiĝinte la mastro kaj la gasto kunmetas siajn manplatojn por saluti unu alian. En la montregiono la mastro etendas sian langon por montri sian bonvenon al la gasto. La lango kaj la koro ambaŭ estas

ruĝaj kaj la ruĝa lango reprezentas sinceran koron.

En la oficiala ŝanco nepalaj amikoj portas sur la kapo difinitan ĉapon nigran aŭ diverskoloran. Ili donas al vizitanto el malproksima loko la nepalan ĉapon por esprimi sian estimon.

Ĉe adiaŭo mastroj ofte donacas al gastoj la nepalan ĉapon, gurkan tranĉilon kaj ŝuojn por vojaĝo.

La gurka tranĉilo arkoforma estas delikata metiartaĵo. Granda speco de ĝi havas longecon de ĉ. 1/3 metro kaj estas familie uzata por buĉi kokojn kaj ŝafojn, haki brulignon kaj tranĉi viandon kaj la malgranda de ĝi havas longecon nur de 1/30 metro kaj oni portas ĝin sur la brusto kiel insignon.



Kiam gastoj devas forvojaĝi, nepalaj mastroj ŝatas donaci al ili ŝuojn zorgeme faritajn permane. La ŝuoj por viroj estas nigraj kaj por virinoj ruĝaj. Per la donaco la nepalanoj deziras al siaj gastoj agrablan vojaĝon kaj belan perspektivon.

ŜTONBOATOJ

Fiŝistoj ambaŭborde de Niĝero en Afriko ofte uzas malgrandajn brunajn boatojn faritajn el ŝtonpecoj.

Kial la ŝtonboatoj povas flosi sur akvo? La kaŭzo kuŝas en tio, ke interne de la ŝtonpecoj produktitaj de la loko troviĝas multaj malplenaj ĉeloj hermetikaj, kies volumeno konsistigas pli ol 78% de tiu de la ŝtonpecoj. La boato farita el tia ŝtono ne nur ne dronas, male ĝi havas grandan flosforton.

(Daŭrigo sur p. 46)

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Lago Bled en Slovenio, Jugoslavio

Foto de franco RENE BASTONG



Templo Jinshan

Fotoj de REN SHIYIN




La fama ĉina budhisma templo situas sur la Ora Monto de Zhenjiang, Jiangsu-provinco kaj estis konstruita dum la periodo 317-420 p. K. Ĝiaj domoj estas masonitaj laŭmonte kun kaŝita kaverno kaj supre sur la monto staras pagodo. La haloj kaj turoj estas interligitaj.

De la tempo de Tang-dinastio, multaj famaj poetoj kaj artistoj vizitis ĝin kaj postlasis multajn versojn pri ĝi. La fama japana pentristo Xuezhou venis al ĝi en 1472 kaj pentris sian valoran verkon "Longyou-templo sur la Ora Monto en Changjiang-rivero de Ĉinio" (Longyou estis alia nomo de la templo).

La pordego de la templo

Lago kun pagodo





Konstruaĵoj

Bronza ding-o (tripieda poto) farita antaŭ 2,700 jaroj, konservata en la templo



Preĝejo



815w

真蟻
李苦禪
一九九九年
圖

